# Ondas Jokohamo

**N-ro 1**

**2007-08-04, sabato**

redakteja retadreso:
ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO


## Saluto de la prezidanto de LKK



Estimataj gastoj kaj karaj kongresanoj!

Bonvenon al Japanio! Bonvenon al la lando en Ekstrema OKCIDENTO, rande de la Paca Oceano; al la lando en ORIENTO kiu iam akceptis hindan, ĉinan kaj korean kulturon, kiu akceptas eŭropan kaj amerikan kulturon tamen iafoje rezistas al ili – ni jam antaŭ 101 jaroj, akceptis internacian lingvon Esperanton kiel ion bonan, ion subtenindan, ion praktikeblan.

Bonvenon al Jokohamo! Kiam en Bjalistoko naskiĝis Zamenhof, nome en la jaro 1859, ĉi tie en Jokohamo oni akceptis alilandanojn, en la ĝis tiam fermitan landon. De tiam Jokohamo servis kiel la pordo de Japanio, precipe kiam ŝipoj estis ĉefa veturilo. NITOBE Inazo, parolanto por Esperanto en tiama Ligo de Nacioj, ekveturis de tiu ĉi haveno eŭropen, se mencii nur unu ekzemplon.

Kaj al multaj japanaj partoprenantoj, vi estas bonvenaj ĉi tie, sentu vin hejme ĉi tie, kaj sentigu aliajn hejme ĉi tie!

Kaj denove al ĉiuj kongresanoj, ni ĝojas havi la okazon, ke homoj kun homoj kunvenas ĉi tie, kunparolas ĉi tie, kun-organizas ĉi tie kaj kun-revas ĉi tie!

Dankon!

SIBAYAMA Zyun'iti,
la Prezidanto de la Landa Kongresa Komitato
de la 92a Universala Kongreso de Esperanto

## Salutoj el diversaj lokoj

**el Vjetnamio**

Gratulon al nia Kongreso la naŭdek-dua
Pro lingvo pacama en lando ĉeriza, grua !
Ni ame, sindone laboru por ĝia prosper'
Por hela estonto de l' Homo, por bela la Ter' !

DAO Anh Kha el Urbo Ho Chi Minh
Honora membro de UEA
Akademiano

**el R.D. Kongo**

Karaj partoprenontoj en la kongreso 2007,

la klubo Stelaro de LUKALA en R.D. KONGO, malgraŭ nia foreco deziras al vi bonan sukceson dum via etosa restado en Japanio. La Eternulo vin benu kaj protektu. Samtempe ni sciigas al vi, ke nia klubo deziras ĝemeliĝi kun aliaj kluboj tra la mondo.

Viaj geamikoj el Stelaro
Joseph NLANDU LUYALA

**el Kenjo**

Mi volas ĉion bonan al tiuj, kiuj partoprenas en la UK en via lando. Mi deziras bonegan sukceson.

Kun koraj salutoj.

Julius Kirwa

**el TOLE**

Mi tre bedaŭras, ke mi ne havas eblecon partopreni la Kongreson. Nun mi dezirus bondezirante sukcesplenan laboron de la Kongreso kaj salutas Vin nome de la Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista/ TOLE /

Ni esperas, ke ankaŭ la 92-a UK kontribuos por la sukcesa agado de la monda esperantistaro.

Kun plej koraj salutoj kaj bondeziroj

prof. Bojidar Leonov
Prezidanto de TOLE

### Utila estas *La Revuo Orienta*

**aŭgusto-septembra numero**

Japana Esperanto-Instituto eldonis tiun ĉi numeron precipe por la nejapanaj kongresanoj. Ĝi estas plena de utilaj informoj por via vivo en Jokohamo: vendejoj, restoracioj, vidindaĵoj, trafikoj, mapoj kaj ĉio. Por bonorde komenci viajn kongresajn tagojn en Jokohamo, unue foliumu kaj kaptu la enhavon ĝenerale, kaj ĉiam portu ĝin kun vi kaj referencu. Ĝi estos la plej forta kaj utila amiko dum la UK.

# LKK INFORMAS

## ★ ekskurso akceptata

**<Tuttaga>**

E1 (Tokio – Edo – Ueno – Bazaroj)
mardo, 5 personoj, akceptas ĝis 5 aŭg.
merkredo, 18 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.

E2 (Tokio – Tocho – Nacia Dieto – Sensoji – Nakamise – Nijubashi)
merkredo, 17 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.

E3 (Meiji Shinto – Toyota – Hamarikyu – Nijubashi)21:00
merkredo, 12 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.

E4 (Kawasaki)
merkredo, 12 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.

E5 (Kamakura)
merkredo, 4 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.
ĵaŭdo, 7 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

E7 (Fuĵi-Monto)
merkredo, 6 personoj, akceptas ĝis 6 aŭg.
vendredo, 30 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

**<Duontaga>**

D1 (Kirin-bierfarejo)
mardo, 19 personoj, akceptas ĝis 5 aŭg.
ĵaŭdo, 26 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

D2 (Souji-ji-Templo kaj meditado)
mardo, 11 personoj, akceptas ĝis la 5 aŭg.



La foto en *Dua Bulteno* estas erara. Vidu la maldekstran.

D3 (Zoorasia)
ĵaŭdo, 34 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.
*Zoorasia* estas unika zoologia ĝardeno, kaj ĝi celas loĝigi bestojn en naturo simila al ilia origina loĝloko. Estas grandaj arboj, sub kiuj vizitantoj povas refreŝiĝi.

D4 (Minato-Mirai 21)
lundo, 20 personoj, akceptas ĝis 5 aŭg.
ĵaŭdo, 9 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

D5 (Jamaŝita, Ĉina Kvartalo kaj Jokohama Haveno)
ĵaŭdo, 7 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

D6 (Sanktejo de Isejama kaj Noo-teatro)
mardo, 5 personoj, akceptas ĝis 5 aŭg.
vendredo, 5 personoj, akceptas ĝis 7 aŭg.

## ★ infanvartejo

**1. Dum la Inaŭguro ni akceptos infanojn**

Gepatroj kun infanoj povas utiligi infanvartadon dum la Inaŭguro (10:00-12:00, 5 aŭg. dimanĉe). Venu al Salono Verda Majo (513) ĝis 18:00, 4 aŭg. sabate por peti tion.

**2. Infanvartado komenciĝos je 9:30 dimanĉe**

Ni akceptos la infanojn apud robo-deponejo en la unua etaĝo de Minato-Mirai-Halo. Kunportu la dokumentojn jam donitajn la 4an de aŭgusto.

(SANO Joŭko)

## ★ korektoj en Kongresa Libro

En Kongresa Libro estas eraroj. Ĉi tie ni skribas nur gravajn erarojn. Nepre korektu en via Kongresa Libro.

p.14, linio10, en 1937 → en 1932

p.16, linio -2, 19:00-21:00 Nacia Vespero
→**18:30**-21:00
Pri la sama eraro ankaŭ p.23, p. 33 kaj p.67

La suba estas **atentigo**:

Malfermiĝos la halo Zamenhof (Minato-Mirai-Halo) je 18:00. Nepre venu antaŭ 18:30, aŭ vi maltrafos la komencon de la Vespero.

Bonvolu **NE FOTI** dum la prezentado de la artistoj. Fotado dum la prezentado tre malhelpas la artistojn, kaj detruas la tutan etoson de japana tradicia arto. Post ĉiu prezentaĵo oni havos 3 minutojn por fotado.

**Ankoraŭ unu atento**: la stabanoj de la halo ne permesos kongresanojn libere eniri la halon dum la prezentado. Dum intermitoj de prezentaĵoj oni rajtas eniri. Iom tro rigora trakto, sed tio ĉi estas por la spektantoj de la prezentaĵoj.

Krome, la halo disdonos bileton, sur kiu indikita estas la numero de sidloko. Vi ricevos ĝin ĉe la giĉeto de la halo. Se vi volas najbare preni sidlokon kun viaj geamikoj, nepre vi venu kune kun la geamikoj kaj laŭvice ricevu la bileton.

p. 17, aldonu jenan linion sub Lundo, ...
09:00-11:00 Esperantologia Konferenco 1, *Lapenna* (detalon vidu p.57)
Same estu ankaŭ p. 24 kaj p.30

p.18, linio -15
15:15-15:30 AIS $2^2$→15:15-**16:30** AIS $2^2$
Pri la sama eraro ankaŭ p. 29

p.18, linio -2
19:30-20:30 Teatraĵo→ **18:30-19:30**
Pri la sama eraro ankaŭ p. 25, p.34 kaj p.68
(la muzika halo malfermiĝos je 18:00)

p.18, linio -1, *Issonbohŝi* →*Issunbohŝi*

p.19, linio -15, 14:00-18:00 → 14:00-**16:00**
(temas pri Esperantologia Konferenco 2. Same estu ankaŭ p. 26 kaj p. 30)
p.19, linio -6,
15:45-16:30 Koncerto→**15:00-16:00**
Pri la sama eraro ankaŭ p. 26, p.32 kaj p.69
p.20, linio 8, koncerto de Junuloj, ***Eroŝenko***
Pri la sama eraro ankaŭ p. 24
p.23 (aldonu jenon en programan tabelon)
Salono Hodler, 13:00-16:00 Oomoto
p.49, linio -6, Fighiera-Sikorska → Ossaka
(la nomo de la ĉambro por Kongresa Kuriero)
p.60, linio 12, Hayakutake → Hyakutake

## ★ Informejo

"Informejo" servas ne nur por doni ĝeneralajn informojn sed ankaŭ por helpi vin, kiu deziras lasi privatan mesaĝon al aliaj kongresanoj per "Rendevua Tabulo".

Giĉeto pri Perdaĵo/Trovaĵo ankaŭ estas ĉe Informejo.

## ★ korekto de skribaĵo pri matenmanĝo

Sur p. 15 de *La Revuo Orienta* enmetita en vian kongresan sakon oni skribas pri matenmanĝo: dekstra parto, linio 16, ĝis 19:00 → ĝis **12:00**

Atentu por ke vi ne maltrafu matenmanĝon!

## ★ enkonduka kurso, ankoraŭ unu fojon!

Sur p. 6 de *La Revuo Orienta* oni skribas pri Enkondukaj Kursoj de Esperanto (dekstra parto, linio 4). Ĝi okazos ankaŭ 14:00-15:30 en la 9-a de aŭgusto.

# Iru ankaŭ al ZAIM

(subkongresejo *Eroŝenko* ĉe NIHON-Odori)

**Sabato, la 4-a de aŭgusto**
13:00 - 19:00 Ekspozicio
21:00 - 22:00 Amika Vespero
japanstila *bon*-danco kaj amuzaj ludoj
22:00-23:00 Koncerto de *Asorti* (litova muzik-grupo)

**Dimanĉo, la 5-a de aŭgusto**
13:00-19:00 Ekspozicio
13:00-15:00 Vegetara lunĉo
Mendu ĉe TEVA-budo en la Movada Foiro.
Maksimume 60 personoj. Kotizo: 1000 enoj.
TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio)
15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo
japanlingva prelego de OSIOKA Taeko
16:00-18:00 Poezia Vespero
Prezentas: Geraldo MATTOS, István ERTL kaj TANIKAWA Shuntaro
Oni akceptas novajn aliĝojn surloke, de 15:30.
Maksimume 100 personoj. Kongresanoj: senpage

## Hodiaŭaj Vizitindaj Programeroj

**1. Unuafojaj Kongresanoj** (15:00-16:00 Lapenna)
Se vi estas unuafoja kongresano, vi estas maltrankvila. Certe vi havas demandojn pri kiel vivi en la kongresejo. En tiu kunsido oni respondos al vi pri viaj tiaj demandoj.
**2. Interkona Vespero**/Movada Foiro(18:00-21:00 Hodler)
En Esperanto-movado estas centoj da asocioj grandaj kaj malgrandaj: landaj asocioj, lokaj grupoj, fakaj asocioj, kulturaj centroj, eldonejoj, edukaj instancoj, grupoj por hobioj ktp. En Movada Foiro pli ol 70 asocioj kaj grupoj prezentas sian agadon per afiŝoj, informiloj, eldonaĵoj, fotoj kaj similaj. Movada Foiro okazas dum la Interkona Vespero. Venu kaj sentu la vastecon kaj variecon de nia movado, kaj samtempe vi povos renkonti malnovajn amikojn kaj ekkonos novajn. La foiro estas malfermita ankaŭ al neesperantista publiko.

## Morgaŭaj Okulkaptaj Programeroj

**1. Inaŭguro** (10:00-12:00 Zamenhof)
La ejo (Minato-Mirai-Halo) malfermiĝos je 09:30. Tial venu frue, laŭeble antaŭ 09:50.
**2. Kongresa Temo 1** (13:00-14:30 Lapenna)
Laŭ la kongresa temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto", oni diskutas. Kongresa Temo 2 kaj 3 okazos respektive en mardo kaj ĵaŭdo.
**3. IKU 1** (Internacia Kongresa Universitato)/AIS 1[1] (15:00-16:30 Lapenna)
**4. Nacia Vespero** (18:30-21:00 Zamenhof)
Atentu! Ne de 19:00, sed **18:30**

## Sinceran Dankon!

**al donacintoj**

BLINDULA KASO
ISAKI Michiko
ĜENERALA KASO
NAKAMITI Tamihiro, TAKEHANA Toŝikazu, KOGA Siro, MIGIHARA Kimie, NAKAMITI Mituko, HUKABORI Yoshifumi, AKADA Joŝihisa, HARADA Ikuo, YOSHIDA Masanori, OKAMOTO Mucuko, MIZUNO Yoshiaki, Ryô Buitirô, OMACHI Fumiaki
INFANA KONGRESETO
ISAKI Michiko
TRIAMONDA FONDAĵO
HUKAMI Sugako
(Ĉi tie menciitaj ne troviĝas en *Kongresa Libro*. Pro tio ni pardonpetas. )

## novaj aliĝintoj

1812 vdvz-l S-ro VODEVOZ Eran/ 10 Ĥad-Nes-str. 52304 Ramat-Gan, Israelo
1813 ammy-p S-ino AMEMIYA Marina/ Edakita 2-1-4-307, Aoba-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 225-0015 Japanio
1814 hnma-o S-ro HONMA Atom/ Miyagawa 5010-116-C12, Tino-si, Nagano-ken, 391-0013 Japanio
1815 mhuk-s S-ino HUKUNAGA Makiko/ Maginu 1833-2-308, Miyamae-ku, Kawasaki-si, Kanagawa-ken, 216-003 Japanio
1816 miud-y S-ino MAEDA Miu/ Ooba-tyo 378 Aoba-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken
1817 nmai-n S-ino NIIKURA Mai/ Matubayasi 2-11-32, Tigasaki-si, Kanagawa-ken, 253-0017 Japanio
1818 sior-s S-ino OGA Shiori/ Kowada 2-14-11 Tigasaki-si, Kanagawa-ken, 253-0012 Japanio
1819 tkma-z S-ro TAKEMURA Akimiti/ Nishikata 1-17-1-301 Bunkyo-ku, Tokyo-to, 113-0024 Japanio
1820 ysui-x S-ro YASUI Tsutomu/ 1-13-10 Higashi-asahina, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 236-0033 Japanio
1821 buta-d S-ro BUTKAUSKAS Bronislovas/ Ramuĉir 14, Neveronys, Kaunas, Litovio
1822 elmk-c S-ino KARCZEWSKA Elźbieta Maria/ ul. Waszyngtona 14 B m 119, 15-269 Bialystok, Pollando
1823 D-ro TRUSKOLASKI Tadeusz Bialystok, Pollando



La 3an de aŭgusto helpantoj el la tuta lando kunvenis kaj laboris por la kongreso.

## hajka angulo

Hajko estas mallonga, japana poemo formita en tri linioj laŭ la ordo 5-7-5 silaboj. Ordinare ĝi entenas sezonan vorton.

someraj ondoj –
kunvenas homoj du mil
el tuta mondo

(HIROTAKA Masaaki)

## Aŭtoraj duonhoroj

sabate, la 4-a de aŭgusto
16:00-16:30 (Paul GUBBINS)
dimanĉe, la 5-a de aŭgusto
16:30-17:00 (MINE Yositaka)
17:00-17:30 (LEE Chong-Yeong)
lunde, la 6-a de aŭgusto
10:30-11:00 (Amri WANDEL)
12:15-12:45
USUI Hiroyuki, AIDA Yayoi, Spomenka ŜTIMEC: pri japanigitaj Esperantaj verkoj
15:30-16:00 (YAMADA Tadasi)
16:00-16:30 (Gerrit BERVELING)
16:30-17:00 (Humphrey TONKIN)
marde, la 7-a de aŭgusto
10:00-10:30 (Judyta YAMATO)
12:00-12:30 (Ulrich LINS)
16:00-16:30 (Anna LÖWENSTEIN)
16:30-17:00 (István ERTL)
ĵaŭde, la 9-a de aŭgusto
15:00-15:30 (Boris KOLKER)
15:30-16:00 (Spomenka ŜTIMEC)
vendrede, la 10-a de aŭgusto
10:30-11:00 (Bertilo WENNERGREN)
11:00-11:30 (Stano MARĈEK: novaj lernolibroj)
11:30-12:00 (YAMADA Tadasi)
vendrede
15:30-16:00 (HORI Jasuo)

## Saluto de la redaktantaro

Bonvenon al Jokohamo. Ni redaktos nian kongresan kurieron *Ondas Jokohamo* laŭ jena principo:

1. Ĝi estu plena de utilaj informoj.
2. Ĝi estu plena de interesaj legaĵoj.
3. Ĝi estu plena de kontribuaĵoj de vi, kongresanoj.

Por igi ĝin tia, ni atendas vian kontribuaĵon.
Rete al <ondas@jei.or.jp>
aŭ enkestigu vian manuskripton ĉe informejo.

Ĉefredaktanto HORI Jasuo



# Ondas Jokohamo

**N-ro 2**

**2007-08-05, dimanĉo**

redakteja retadreso:

ondas@jei.or.jp

**KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO**


## Saluto de la prezidanto de UEA

**Inaŭgura parolado okaze de la UK en Jokohamo**



Estimataj reprezentantoj de japanaj kaj eksterlandaj ŝtatoj kaj instancoj, estimataj reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, karaj esperantistoj,

la malfermaj kongresaj paroladoj de L. L. ZAMENHOF havis neimiteblan stilon. Tra la tuta jarcento pluraj provis imiti lin, sed, laŭ mia opinio, sensukcese. La problemo pri tiuj imitoj estas, ke ili kaptas nur la eksteran aspekton de la paroladoj de Zamenhof, ili kaptas la retorikan ŝelon sed al ili mankas la kerno. La kerno estis la fakto, ke Zamenhof vere kredis tion, kion li diris, kaj la koro, mi dirus “la koreco”, la pasio, kiun li enmetis en siajn paroladojn.

En la unua kongreso en Bulonjo-sur-Maro, li diris: “Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!”

Fakte grandaj kaj gloraj estis ĝiaj sekvoj, tiom grandaj kaj tiom gloraj, ke hodiaŭ ni povas diri, ke inter la modernaj kaj gastamaj muroj de Jokohamo kunvenis ne japanoj kun ĉinoj, ne usonanoj kun irananoj, ne rusoj kun brazilanoj, ne taĝikoj kun koreoj, sed homoj el ĉiuj mondopartoj.

Malgraŭ tio, tamen homoj daŭre diras al ni: Ĉu Esperanto ankoraŭ havos funkcion en la hodiaŭa mondo? Ĉu ĝi ne restas unu el tiuj sindonaj utopioj el tiu mirinda periodo de espero, kiun la eŭropanoj travivis dum la fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcento? Ĉu nun la mondo ne estas esence malsama ol ĝi estis tiam? Kie estas la tiamaj idealoj de gefrateco, homa interhelpo, tutmonda paco, kun kiuj Esperanto kuniris? Tiam la homaro batalis por aserti tiujn novajn valorojn.

Nun la batalo, bedaŭrinde, estas farata de la plej forta parto de la homaro por entute forigi ilin.

Fakte, se oni rigardas ĉirkaŭe en la normala mondo, oni vidas nur timojn. Oni vidas nur civilizojn, kiuj atakas civilizojn kaj pretigas armilojn ĉiam pli timindajn kontraŭ imagataj estontaj malamikoj. Oni vidas la ideojn de efikeco multege plipezi kompare al la ideoj pri socia solidareco. Oni vidas, ke la tuta retoriko pri helpo al disvolvo de la ekonomie malriĉaj landoj montras sian veran vizaĝon: retoriko kaj nenio alia.

Ĉu en ĉi tiuj kondiĉoj estas ankoraŭ loko en la mondo por Esperanto?

Mi senhezite respondas per granda jeso.

Ankaŭ la tempoj de Zamenhof estis malfacilaj. Krome, okupiĝi pri Esperanto esence signifas okupiĝi pri justeco, kaj tio ĉiam estis malfacila. Tamen aspiron al justeco oni ne mortigas. Ĉiuj televidoj de la mondo povas rediri al vi dum 24 horoj, ke la tago estas nokto, sed ili ne povas eterne kredigi al vi tion. Mensogoj restas mensogoj, eĉ kiam ĉiuj televidoj de la mondo diras la malon. Nacia lingvo restas nacia lingvo, eĉ kiam ĉiuj “inteligentuloj” de la mondo diras al vi, ke ĝi estas internacia.

Bonŝance la aspiro al justeco renaskiĝas en la animo de ĉiu juna homo en ĉiu generacio.

Kiel la juna Ludoviko, ne hazarde juna, la Esperanto-movado daŭre estis kaj ĝis nun restas kontraŭ perforta solvo de intergentaj problemoj. Ĉu vi memoras la dolor-krion de Zamenhof: “Malbenita, milfoje malbenita, estu la intergenta malamo!”? Kontraŭ tiu malamo ni laboras, ne por pruvi la superecon de lingvo kun akuzativo.

Se ni entute produktis unu ideon, kiu estas valora ankaŭ por la ekstera mondo dum ĉi tiuj 100 jaroj kaj pli, tiu estas ĝi: homoj naskiĝas egalaj ankaŭ kiam temas pri lingvoj. Ĉio cetera estas komentoj.

Armitaj per tiu ideo, ni laboru en la mondo kaj por la mondo.

Fakte mi kredas, ke Esperanto estas nun vokata ludi sian pontan rolon je monda skalo, ne nur en Eŭropo, sed inter la malsamaj kultur-regionoj de la mondo, la eŭropa/usona, la islama, la orient-azia, la sudamerika, ktp.

Se ni ne respondas al tiu voko kaj insistas okupiĝi ĉefe pri la problemoj kunmeti polojn kaj germanojn,

ni estos preterpasataj de la mondo. En la mondo la grandaj problemoj nun estas ne la rivaleco inter Germanujo kaj Francujo sed la rivalecoj inter Ĉinujo, Hindujo, la islamaj landoj, Usono (kaj tiu Eŭropo, kiu deklaras sin parto de ĝi), Afriko, ktp. En ĉi tiu mondo de rivalecoj Esperanto devas porti sian kontribuon por faciligi la dialogon inter homoj de bona volo apartenantaj al la malsamaj grupoj. Tiel ĝi konservos sian signifon kaj eĉ pliigos ĝin.

La politiko de Esperanto en nur unu kontinento jam ne plu estas ebla. Tio ne signifas, ke oni ne luktu en sia kontinento por Esperanto, eĉ male, laŭ la devizo: pensi tutmonde kaj agi loke. Ni, tamen, konsciu, ke Esperanto almenaŭ estas iĝanta, ponto inter ĉiuj mondaj regionoj, kaj ni helpu tiun procedon.

Mi mem hontus, kiel esperantisto kaj admiranto de Zamenhof, ne okupiĝi pri la grandaj problemoj de ĉi tiu momento. Kiam Unesko mem kaj multaj neesperantistoj mem fariĝas pli kaj pli sentemaj pri la danĝero de malapero de lingvoj kaj kulturoj kaj provas fari ion, ni ne povas lasi la neesperantistojn solaj en la defendo de la parolantoj de malgravaj kaj atakataj lingvoj. Atentu: malgravaj kaj atakataj nuntempe estas preskaŭ ĉiuj lingvoj. Nia tasko estas defendi la lingvajn homajn rajtojn de milionoj de homoj en la mondo, kiuj estas ĉiutage, ĉiuhore, ĉiumomente diskriminaciataj pro la lingvo, kiun ili parolas, pro la lingvo-grupo en kiu ili naskiĝis. Pri lingvoj ne estas ankoraŭ nun vera la aserto ke "homoj naskiĝas egalaj". En ĉi tiu situacio ni simple ne rajtas retiriĝi el la granda mondo, krom se ni volas tute perfidi la originan celon de nia movado.

Mi ĝojas fini mian periodon de prezidado en Japanujo, en Azio kaj vidi de la podio ĉi tiun salonon. Ĉu ĉi tiu estos efektive la jarcento de Azio en la mondo kaj de aziaj esperantistoj en la tutmonda movado, estas ankoraŭ tro frue por klare vidi. Mi povas esperi pri tio.

Mi volas tamen ankoraŭ profiti vian tempon por transdoni al vi du mesaĝojn.

Unue: ne aŭskultu malverajn profetojn. Ne ekzistas mirakloj. Esperanto progresis dum sia historio per la laboro de miloj kaj miloj da homoj kiel vi, mildaj, trankvilaj sed obstinaj laborantoj pro la bono de la mondo. Ĉiu, kiu komercas per retorikaj babiloj, per tre belaj kaj impresaj paroladoj sen iu ajn intenco apliki mem tion, kion li aŭ ŝi predikas, perdigas al vi tempon, eĉ se li aŭ ŝi ne intencas trompi vin, sed nur imponi al vi. Permesu al mi, kiu daŭre verkis kongresajn rezoluciojn, ĝuste taksi la valoron de belaj vortoj, kiuj restas belaj vortoj.

Ĉiu, kiu promesas la tujan finan venkon per teĥnikaj aŭ aliaj rimedoj, nur kondiĉe ke vi financas lian aŭ ŝian agadon trompas sin mem aŭ nur provas trompi vin.

Ĉiu, kiu invitas vin rezigni pri via laboro por Esperanto kaj nur ĝui la fruktojn de tio, kion aliaj faras por krei parolantaron de Esperanto, estas ne nur malvera profeto sed ankaŭ malhonesta profeto.

Ĉiu, kiu forgesas la admonon de Zamenhof pri tio, ke sur nia flago estu skribita la vorto "konkordo", kaj interesiĝas ĉefe pri manieroj instigi malkonkordon, estas ne nur malvera sed ankaŭ malŝatinda profeto.

Due: ŝanĝu ĉion por ke nenio ŝanĝiĝu. Ni vivas en mondo en kiu okazas daŭraj teĥnikaj progresoj. Estas esence adaptiĝi al ĝi. La Esperanto-movado estas jam tute alia rilate al la momento, en kiu mi eniris ĝin. Tiam oni skribis 10-kopiajn cirkulerojn per karbopapero kaj per forta premado de la klavaro de la skribmaŝino. Nunaj esperantistoj eĉ ne scias, kio estas karbo-papero. Pluadaptiĝi al la teĥnika mondo estas necesa kaj por UEA kaj por la landaj asocioj kaj por la lokaj grupoj. Reta informado kaj retaj kursoj estas esencaj iloj. Ne preteratentu tion. Sed ankaŭ ne tro atentu tion. La enhavo estas ankoraŭ pli grava ol la ilo, per kiu oni komunikas. Nenio baze ŝanĝiĝis en la movado: la plej grava teĥnika rimedo estas ankoraŭ homoj pretaj labori por konvinki aliajn homojn pri bela ideo, pri bona ideo por la mondo. Ĉio cetera estas nur teĥnikaĵoj.

Tamen kaj niaj gejunuloj kaj niaj gemaljunuloj konkurencas inter si por adaptiĝi al tiuj teĥnikaĵoj, kaj do ne devus esti problemoj, eĉ eniri la plej ĵusajn virtualajn realojn, kiuj povus oferti potencialojn por Esperanto.

En sia lasta kongresa parolado en la 8-a UK en 1912-a, Zamenhof diris: "... multajn el vi mia nuna parolo malagrable seniluziigos ... vi eble demandos ĉu en sia lasta kongresa parolo... li nenion pli havas por diri al ni?" Kaj li respondis al si mem: "Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena..."

Same mi havas ankoraŭ amason da aferoj dirindaj, sed ĉi tiu ne estas la ĝusta momento, ĉar mi jam tro longe parolis. Mi baldaŭ reakiros la plej altan rangon en Esperantujo: "simpla esperantisto" kaj en tiu rango vi retrovos min inter vi, la aliaj simplaj esperantistoj, kaj mi havos amason da okazoj por ankoraŭ danki vin pro la pasinta kunlaboro kaj plue kunlabori kun vi. Mi sopiras je la momento, kiam mi ĉesos esti prezidanto kaj fari paroladojn, kaj povos okupiĝi finfine pri io utila al Esperanto.

Dankon al vi ĉiuj!

Renato CORSETTI

## Sur la podio en la Inaŭgura Soleno

Sidas KANEDA Takayuki (vicurbestro de Jokohamo), USUI Hiroyuki (interpretisto), Yukio TSUDA (kondukanto de la kongresa temo), KIMURA Goro (interpretisto), GOTOO Hitosi (IKU-rektoro), SIBAYAMA Zyun'iti (prezidanto de LKK), Renato CORSETTI (prezidanto de UEA), Claude NOURMONT, (vicprezidanto de UEA), Ulla LUIN (ĝenerala sekaretario), Ans BAKKER (estrarano de UEA), Maritza GUTIERREZ (estrarano de UEA), Amri WANDEL (estrarano de UEA), YU Tao (estrarano de UEA), Brian MOON (vicprezidanto de AdE), Peter BALAZ (TEJO), Zsofia KORODY (ILEI), Osmo BULLER (ĝenerala direktoro de UEA)

## Ĉeestas diplomatoj en la inaŭguro

s-ino Natalija BRMBOTA (ambasadoro de Kroatio)
s-ro Chaim CHOSHEN (vicambasadoro de Israelo)
s-ino Irena GANCHEVA (diplomato de Bulgario)
s-ro Hans-Peter FLUCKIGER (konsulo de Svisio)
s-ro Mario Jose DE MENEZES (vickonsulo de Brazilo)

## novaj aliĝintoj

1824 Zezey MIEJANA/ vpajanice 7, 10040, Zagrebo, Kroatio
1825 LEE Seung-Yun/ Hiwikyong 183-173, Dongdaemun, Seoul, Koreio
1826 HUKUNAGA Asako/ Maginu 1833-2-308, Miyamae-ku, Kawasaki-si, Kanagawa-ken, 216-0035 Japanio
1827 SATOO Masaki/ Sugao 6-7-3, Miyamae-ku, Kawasaki-si, Kanagawa-ken, 216-0015 Japanio
1828 ITO Tecuĵi/ Watari-tyo 2617-1, Mito-si, Ibakaraki-ken, 310-0902 Japanio
1829 OUTI Koiti/ Dai 5-2-12-A203, Kamakura-si, Kanagawa-ken, 247-0061 Japanio
1830 NAKAO Ryosuke/ Edogawa 1-4-11-310, Koutou-ku Tokyo-to, 135-0051 Japanio
1831 IWAMA Yuki/ Aoto 8-14-5, Katusika-ku, Tokyo-to,125-0062 Japanio
1832 ITO Shojiro/ Tarumati 1-22-20-304, Kouhoku-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 222-0001 Japanio
1833 FUKUDA Ayumi/ Simoigusa 4-7-11, Suginami-ku, Tokyo-to, 167-0022 Japanio
1834 SAKAI Mayako/Nobidome 3-12-43, Niiza-si, Saitama-ken, 352-0011 Japanio
1835 TAKAHASHI Noa/ Simiyamada-tyo 2739-12, Matida-si, Tokyo-to, 194-0202 Japanio
1836 TAKAHASHI Yui/ Simiyamada-tyo 2739-12, Matida-si, Tokyo-to, 194-0202 Japanio
1837 KASHIWAGI Teruko/ Hayasi 3-565-30, Tokorozawa-si Saitama-ken, 359-1167 Japanio
1838 TACUMI Hirosi/ Tendou-tyo 15-15, Nisinomiya-si, Hyogo-ken, 663-8104 Japanio
1839 MISAWA Seiichirou/ Minamirinkan 5-3-16-214, Yamato-si, Kanagawa-ken, 242-0006 Japanio
1840 MIYAMURA Kana/ Nissin-tyo 5-1-8, Tomakomai-si, Hokkaido, 053-0833 Japanio
1841 HIRUKAWA Seiko/ Ogawa-tyo 1-1071-15, Kodaira-si, Tokyo-to, 187-0032 Japanio
1842 KIMURA Kisiro/ Nougaya 619-42, Matida-si, Tokyo-to, 195-0053 Japanio
1843 KIMURA Nagi/ Nougaya 619-42, Matida-si, Tokyo-to, 195-0053 Japanio
1844 TANAKA Masanori/ Mezirodai 1-23-6-701, Bunkyo-ku, Tokyo-to, 112-0015 Japanio
1845 TAKAHASI Sara/ Simoyamada-tyo 2739-12, Matida-si, Tokyo-to, 273-912 Japanio

# LKK INFORMAS

## ★Hodiaŭaj Vizitindaj Programeroj

**1. Solena Inaŭguro** (10:00-12:00 en *Zamenhof*)

Aŭskultu la lastan saluton de Renato CORSETTI; Kongresa temo: Yukio TSUDA (profesoro de Universitato Tsukuba, kurso por diplomitoj); Dancpaŭzo: 19 dancistoj festas la inaŭguron.

**2. IKU 1 / AIS 1**[1]

Ĉi-jare Internacia Kongresa Universitato festas sian 60-an datrevenon. Elektu laŭ via plaĉo, lernu kaj parolu.

**Amri WANDEL**: Orienta astronomio: gasto-steloj en la Galaksia Fervojo (15:00-16:30 en *Lapenna*)

**José Antonio VERGARA**: Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj (17:00-18:00 en *Lapenna*)

**3. Prelegoj pri Japanio**

Naciaj trezoroj (14:45-15:45 en *Yamazoe*)
Japanoj japanas (17:00-18:00 en *Yagi*)

**4. Nacia Vespero**

*Gagaku* (japana kortega danco kaj muziko), Kotoa muziko akompanata de japana banbua fluto ŝakuhaĉo, japana tradicia danco, japana tamburado

**5. Vespera promenado** (20:05-23:00, antaŭ la kongresejo)

Laŭ la marbordo ĝuante la belajn pajzaĝojn de la haveno

## ★Morgaŭaj Okulkaptaj Programeroj

1. **Kleriga lundo** (09:00-14:00 en diversaj salonoj)
Dum tiu periodo okazas diversaj temoj.
2. **Azia agado** (15:00-18:00 en *Ludovikito*)
Vidu kiel Esperanto prosperas aŭ ne prosperas. Ni diskutu por pli da progreso.
3. **Kongresa balo** (21:30-23:00 en Hodler/Lapenna)
Per danco ni amikiĝu!

# Iru ankaŭ al ZAIM

(subkongresejo *Eroŝenko* ĉe NIHON-Odori)

**Hodiaŭ, dimanĉe, la 5-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio
13:00-15:00 Vegetara lunĉo
15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo, japanlingva prelego de OSIOKA Taeko
16:00-18:00 Poezia Vespero
Prezentas: Geraldo MATTOS, István ERTL kaj TANIGAWA Shuntaro. Oni akceptas novajn aliĝojn surloke, de 15:30. Kongresanoj povas ĉeesti surloke

**Morgaŭ, lunde, la 6-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio
15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo, japanlingva prelego de OSIOKA Taeko
21:00-01:00 Babilejo kaj Diskejo: diskludas Leo Sakaguchi (Germanio)

**Partoprenantoj en Antaŭkongresoj atingis Jokohamon iom lacaj sed sufiĉe kontentaj!**

Antaŭ ol la kongreso komenciĝis, la aliĝintoj al Antaŭkongresoj jam spertis la belan naturon kaj tradiciajn kulturojn de Japanio.

**AK1**, vizitis la malnovajn metropolojn, nome Kioton kaj *Nara* kie atendis lokaj esperantistoj por akompani kaj klarigi.

**AK2**, kiu vizitis la urbojn, Hiroŝimon, *Okayama*, *Himezi*, Kioton, gustumis lokan manĝaĵon "Hiroŝima *Okonomi-yaki*", kaj ĝuis ĉion kion lokaj esperantistoj longe preparis.

**AK3**, kiu konsistas nur el 6 membroj, ĝuis la naturon kaj tradiciajn artaĵojn en *Nikko* kun perfekta akompano de 3 ĉiĉeroninoj.

Kvankam okazis kelkaj akcidentoj en la grupo, kaj tajfuno estis atakanta la okcidentan Japanion, la membroj de tri Antaŭkongresaj ekskursoj, plene ĝuis la unuajn tagojn en Japanio, dank'al esperantistaj ĉiĉeronoj kaj lokaj esperantistoj.



En A2 oni vizitis la urbon Okayama. En Kôrakuen-parko knabino de Esperanto-Klubo de la supermezlernejo Sanyô ĉiĉeronis. Oni informos la aferon per televido en la 7a de aŭg.

**PAROLIGAJ LECIONOJ DE EDUKADO.NET**

(Ĉiun kongresan tagon, de lundo ĝis vendredo)



**"Pinĉilumu kun ni!"**

Uzante pinĉilojn ni deziras helpi en tio, ke konversaciemaj esperantistoj povu trovi babilpartnerojn.

Komencantoj metu verdan pinĉilon sur sian vestaĵon, kiam ili bezonas ekzercadon en la lingvo kaj deziras paroli kun aliaj esperantistoj. La verda pinĉilo indikas, ke ili ŝatus babili.

La pli spertaj esperantistoj uzas ruĝajn pinĉilojn por indiki, ke ili havas tempon, volonte konversacias eĉ kun malpli spertaj samideanoj por helpi ilin en la lingvoekzercado.

Ne forgesu forpreni vian pinĉilon se vi ne plu havas tempon! Pinĉiloj akireblas dum la lecionoj de edukado.net.

**AERA-Renkontiĝo**, do la rendevuo de la amikoj de la E-elsendoj okazos ĵaŭde, la 9-an de aŭgusto en la salono *Lapenna*.

red. Barbara PIETRZAK (kn.1662)

**Rostbankedon partoprenu!**

dato: 16:30-20:00, la 8an de aŭg. merkrede, la tago de tuttagaj ekskursoj
loko: Amasloĝejo (la Urba Centro de Eksterdoma Aktivado por Junuloj en Mitsuzawa-kôen)
kotizo: 700 enoj (Vi povas ĝissate manĝi, tamen sen alkoholaĵo)
Mendu en la loĝiga servo en la 5a etaĝo.

**Poŝtoficejo funkcias en la 4-a etaĝo**

13:00-17:00, la 5-an de aŭg., dimanĉe
09:00-16:00, la 6an (lunde), la 7an (marde), la 9an (ĵaŭde), la 10an (vendrede) de aŭg.

Ĉe la poŝtoficejo oni povas aĉeti la ordinarajn poŝtmarkojn kaj la memorigajn poŝtmarkojn de la UK, kaj ricevi specialan stampon de la UK.

**Vin atedas RIKIŜO** antaŭ *ZAIM*, aŭ antaŭ *Rose*-hotelo (proksime de *Kasei-rô*, kiel oni skribas sur p. 8-9 de *La Revuo Orienta*, kiu estas enmetita en via kongresa sako). 2000 enoj por du personoj dum dek minutoj. La rikiŝisto eklernis Esperanton por la UK!

**hajka angulo**

klimatizite,
paroloj tamen ardas –
salon' Lapenna

(HIROTAKA Masaaki)

# Ondas Jokohamo

**N-ro 3**

**2007-08-06, lundo**

redakteja retadreso:
ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO


# La 92-a Universala Kongreso de Esperanto Solene Inaŭguris!

Komence la prezidanto Renato CORSETTI prezentis podianojn kaj honorajn gastojn: diplomatojn, la gvidantinon de Oomoto ktp. La mesaĝon de la urbestro NAKADA Hirosi laŭtlegis la vicurbestro. Ulla LUIN legis mesaĝon de Zaleski-Zamenhof, la nepo de la majstro.

Post bonveniga saluto de LKK sekvis enkonduka parolo pri la kongresa temo. Yukio TSUDA parolis, ke “akcepto” estis fakte “akceptigo” deviga, kaj la rezisto estas necesa. Li parolis en la japana kaj KIMURA Gorou tradukis en Esperanton.

Anstataŭ kutima muzika paŭzo, ĉi-jare geknaboj vigle dancis moderne sed en la tradicia kostumo.

Post la paŭzo Renato CORSETTI faris festoparolon kiel la lastan taskon en sia prezidanteco (Legu la 2an numeron).

Post salutoj de reprezentantoj de TEJO kaj SAT, la prezidanto prezentis novajn honorajn membrojn : KONISI Gaku kaj Endre DUDICH.

Sekvis “la plej ŝatata programero”: saluto de reprezentantoj de la landoj. El 50 landoj la reprezentantoj salutis unu post la alia.

La salutadon gvidis Amri WANDEL kaj Maritza GIUTIERREZE. Poste parolis KURISU Kei, 97-jara veterano japana apelaciis ke plivigliĝu la Esperanta libro-kulturo.

La partoprenantoj kantis “La Espero” kaj la prezidanto deklaris malfermon de la 92-a UK.



## Saluto de Louis C. ZALESKI-ZAMENHOF

Sinjoro Prezidanto,
Gesinjoroj, Honoraj Gastoj,
Estimataj Gekongresanoj,

Geamikoj karaj, alvenintaj al Jokohamo el ĉiuj partoj de nia planedo, akceptu la tradician Zamenhofan saluton !

Vi reunuiĝis por ĝui la sen-egalan, neforgeseblan etoson de niaj kongresoj kaj por debati i.a. pri la akcepto de Okcidento en Oriento aŭ pri rezisto tiurilata. Tiu elektita kongresa temo aperas urĝe aktuala en nia epoko de tutmondiĝo. Fakte, unu jarcenton post nia unua Universala Kongreso, kiam “...inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...”, nun, citante la vortojn de nia Prezidanto, “... homoj kun homoj tie ĉi reunuiĝantaj venas ne nur de Eŭropo sed de plej diversaj kulturregionoj de la mondo”.



Mi, persone, estante inĝeniero de pontoj, ege ŝatus kontribui al konstruo de pontoj de interkompreno kaj de akcepto reciproka inter Oriento kaj Okcidento. Dum mia profesia kariero, plurajn jarojn mi funkciis kiel konsilisto ĉe mondfama Tokia konstrufirmao. Tiam, dum miaj oftaj restadoj en via lando, mi spertis persone la akcepton de Oriento: mi ĝuis amikecon de miaj tiamaj kunlaborantoj, mi estis kore akceptata en iliaj hejmoj, konatiĝis kaj amikiĝis kun iliaj gefamilianoj. Kelkajn jarojn pli malfrue mi estis akceptita ankoraŭ pli sincere, estante, kun mia edzino, invititoj de Oomoto, al kies membroj mi ŝatus eldiri tie ĉi mian apartan saluton.

Mi ŝatus aparte saluti ankaŭ doktoron Kobayashi kaj la teamon de tradukintoj de *La Zamenhof-strato*, kies laboro estis rekompencita per la belega eldono de la japana versio de la libro. Fine mi dezirus honori la memoron pri Itô Kanzi, mia forpasinta spirita frato Ludovikito, el kies senlaca strebo rezultis impona kolekto de la plena verkaro de nia komuna Avo, kies ideoj estas akceptataj de bonpensantoj same en Okcidento kiel en Oriento.

Tamen, kontraŭe al miaj personaj spertoj, mi konscias ke la rezisto inter Oriento kaj Okcidento certe ankoraŭ ne malaperis. Ĝi rezultas de malkompreno ne nur de lingvo sed ankaŭ de kutimoj kaj ĝenerale de kulturoj malsamaj. Por venki tian reziston ni devas esti armitaj de toleremo ambaŭflanka. Estas ja la idealo de toleremo, kiu antaŭ cent dudek jaroj naskis nian Lingvon Internacian, por ke ĝi faciligu la komprenon de la diverseco kaj sekve la akcepton de tiu diverseco – de diverseco, sekve de multnombro de kulturoj, kontribuanta al la spirita riĉeco de la homaro.

Ni esperantistoj kontribuas per nia agado al la akcepto kaj ni kontraŭbatalas la reziston inter Oriento kaj Okcidento. Mi forte deziras al via Kongreso, ke ĝi estu grava paŝo sur la vojo kondukanta al tiu nobla celo.

Louis C. Zaleski-Zamenhof

# Mesaĝoj el Hiroŝimo al la mondo

Antaŭ 62 jaroj, en la 6-a de aŭgusto, je 08:15 sur Hioroŝimon falis atombombo. Ĝis nun konserviĝis nur unu detruita konstruaĵo, atestanta pri la tragedio, kiu nun konsistigas la Hiroŝiman Pacan Muzeon. La Muzeo baziĝas sur la nocio, ke nuklea armilaro neniam povintus esti uzita, neniam rajtas esti uzota.

Kion do ni faru por ke neniam plu okazu la samo? Kiel ni kreu la mondon en kiu sen iu ajn dubo armiloj ne bezoniĝas?

Ni jam ne plu rajtas solvi niajn konfliktojn kaj decidi per konkuro de ĉion detruanta forto ĉe kiu flanko staras la Dio. Nun ni devas alpreni aliajn metodojn por forigi konfliktojn, ekzemple per interparoloj, negocoj, interkonsento kaj leĝo.

**Voĉoj por paco en la mondo**

0sioka Taeko, urbano de Hiroŝimo, instruistino de elementa lernejo, prelegos en ZAIM (subkongresejo Eroŝenko) pri kelkaj reagoj pri la Internacia Virina Tago Hiroŝima.

De antaŭ 6 jaroj laŭ ŝia propono la Plenum-komitato de la Tago sendas leterojn en Esperanto al la mondo en diversaj temoj. Ĉi-jara plano okazis en la temo: “La senmilitan morgaŭon al la infanoj”, kaj ŝi petis al adresitoj, ke ili prezentu siajn spertojn pri la milito. Venis 158 respondoj el 50 landoj. Ŝi ĝojas, ke la komitatanoj eksciis, ke Esperanto estas tiel utila, ke forte Esperanto ligas homojn en la mondo.

Osioka Taeko en 30-minuta programo en la 6-a, 9-a kaj 10-a en *ZAIM* sinsekve prezentos kelkajn leterojn, kiuj inkluzivas la leterojn el Koreio (spertinto de Korea-milito), el Kongo (spertinto de interna milito), el Serbio-Montenegro (poemoj versitaj sub aeratakoj en eksa Jugoslavio) kaj el aliaj.

★Komence de la Internaciaj Ekzamenoj je 14:15 organizantoj planas unuminutan silenton memore al la viktimoj.

**Mesaĝoj de la kongresanoj:**

**1.** Por komenci mi mencios, ke mi lernis Esperanton nur pro tio ke mi estas pacamanto. Je la fino de la lasta milito mi ekpensis, ke ni tute ne bezonas armilojn. Ŝtatoj devas detrui ĉiujn armilojn. Ni bezonas lingvon por kunlabori kontraŭ militistoj en ĉiuj landoj. En la jaro 1994 mi vizitis Hiroŝimon, kaj certe tio estis por mi la plej emocia sperto en mia vivo. Jean Marin (KN 126)

**2.** Ni ĉiuj deziras pacon por la tuta mondo. Tiucele ni devas ĉiun tagon pripensi pri tio, mem lukti por tio, kun niaj ĉirkaŭuloj kaj tutplanednivele. Mireille Grosjean (KN 119)

**3.** La tragedio de Hiroŝimo nun estas en historio, kaj ĝi estu tie. Daniel Culthert (KN 1857)

**4.** Estas malfacile diri ĉu mi estas bonŝanca, ĉu kontraŭe, tamen la spirdetena informo pri la faligo de la unua atombombo firmas en mia memoro de la lerneja aĝo. En Pollando suferigita de la 2-a Mondmilito la konscio pri la kataklismo en Japanio estis vigla. Mian propran konscion kaj propran konon firmigis la vizito al Hiroŝimo. Nun, en la mondparto, en kiu mi loĝas, tio iom paliĝis, ŝajne. Aliflanke, kiel nun ni deziras memorigi al la pola

socio kaj la mondo la signifon de la Varsovia Insurekcio en 1944, simile ni ne permesu al la mondo forgesi la hororan mesaĝon de Hiroŝimo el la 6-a de aŭgusto 1945.

## Kongresanoj Invitas

**1. Medicinista vizito** al Rehabilitada Centro de Jokohamo

La Centro estas la urba institucio, kiu zorgas kaj trejnas handikapitojn post apopleksio aŭ alia malsano en sia hospitalo, aŭ vizitante iliajn hejmojn. Ĝi ankaŭ faras sugestojn kiel reformi ilian domon por pli facile vivi en sia hejmo. Vizitantoj, sub la gvido de prof. Ueda, estos en la institucio de 13:30 ĝis 16:00. Oni ankaŭ prezentas filmon pri la historio kaj mastrumado de la institucio.

Medicinistaj interesitoj estas petataj kolektiĝi je 12:30 antaŭ la Kongresejo. La vizitantoj veturos en grupo.

Hideki HARADA (KN 00219)
poŝtelefono: 080-5231-5616

**2. Go-konkurso**

Go-konkurso okazos je 13:00-18:00, la 9-an de aŭgusto (ĵaŭde) en Uĉuu-kiin, najbare de la stacidomo de Jokohamo (8-a etaĝo de Yokohama Tôyô Build. (adreso: 1-1-8 Kitasaiwai, Nishi-ku; tel.: 045-323-1515)




**3. Kongresa temo**

Vi ĉiuj estas bonvenaj por ĉeesti en la programeroj pri la kongresa temo: "Okcidento en oriento: akcepto kaj rezisto". La rilataj sesioj okazos dimanĉe (13:00-14:30/Lapenna, jam finita), marde (15:00-17:00/Yagi) kaj ĵaŭde (12:00-14:00/ Ludovikito). Estos prelegetoj pri la temo, i.a. de Probal DAŜGUPTO, A. Giridhar, Ulrich LINS, KITAGAWA Hisasi, KIMURA Goro Christoph, Bill MAK kaj ankoraŭ de aliaj. Marde oni ankaŭ havos tempon por diskutoj en malgrandaj grupoj. Kiel orientilo por diskutoj utilus anticipe pripensi la ĉi-subajn kvin demandojn: 1. Kio estas "oriento", kaj kio estas "okcidento" laŭ vi? 2. Kiel "oriento" kaj "okcidento" renkontiĝas ĉe vi? 3. Ĉu la diferenco de oriento/okcidento ne supereblas? Ĉu neŭtrale homa kulturo estas ebla? 4. Ĉu Esperanto povas roli kiel lingva renkontiĝejo inter oriento kaj okcidento? 5. Ĉu oriento kaj okcidento povas havi komunan historion?

USUI Hiroyuki (kn 200)

## Informoj pri programeroj

**1. IKU8 (Zhu) okazos lunde,14:00 en *Ludovikito*.**

**2. Rondo familia** okazos vendrede, je 17:00 en *Hodler*.

**3. AIS $1^3$ (Wandel)** okazos je 13:15, kaj **AIS $2^3$ (Vergara)** okazos je 16:30, ambaŭ vendrede en *Yagi*.

(Anonco 1) Fakaj Asocioj kiuj ŝatus partopreni la fakan budon kontaktu Amri WANDEL aŭ venu al la giĉetoj marde je 09:00.

(Anonco 2) La libro de la Internacia Kongresa Universitato aperis kaj estas aĉetebla en la Libroservo (prezo:1500 enoj, 121 paĝoj, 9 IKU-prelegoj)

**4. AERA-Renkontiĝo**, do la rendevuo de la amikoj de la E-elsendoj okazos ĵaŭde, je **14:00** la 9-an de aŭgusto en la salono *Lapenna*.

red. Barbara PIETRZAK (kn.1662)

**5. Esperanto-Ligo Filatelista** invitas anojn de sia asocio, ĉiujn interesitojn, ĉeesti kunvenon, en kiu oni interparolos pri filatelo en Esperanto, kolektado de esperantaĵoj, k.a. ELF-AREK kaj ties kontribuo al la historio de la movado.

Renkontiĝo: ĉe giĉeto de la poŝtoficejo, en la 4-a etaĝo, mardon la 7-an de aŭg. je 12:00

Elda DOERFLER (KN 486)

## LKK INFORMAS

**Atenton!**

**1.** Partoprenantoj de la tuttagaj ekskursoj, kiuj mendis surloke, ne ricevos lunĉon. Bv. mem aĉeti lunĉon. Se vi pli frue mendis, vi povos ricevi lunĉon.

**2.** Kelkaj el loĝantoj en la amasloĝejo ankoraŭ ne pagis loĝkoston. Bv. veni por pagi ĉe la loĝiga servo en la 5-a etaĝo!

**3.** Partoprenantoj en la duontagaj ekskursoj kolektiĝu ĉe la elirejo de **la etaĝo 1 (teretaĝo)**.

**4.** Partoprenintoj en la 50a UK en Tokio en 1965 anoncu sin al Judyta YAMATO (KN 874), aŭ *Kongesa Kuriero* en la ĉambro de LKK.

# Iru ankaŭ al ZAIM

(subkongresejo *Eroŝenko* ĉe NIHON-Odori)

**Hodiaŭ, lunde, la 6-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo, japanlingva prelego de OSIOKA Taeko

21:00-01:00 Babilejo kaj Diskejo: diskludas Leo Sakaguchi (Germanio)

**Morgaŭ, marde, la 7-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

13:00-13:45 Teatraĵo: "Feliĉo de unu talentulo"
Prezentas: gestudentoj de Sophia Universitato (Tokio).

14:00-16:00 Gustumu Japanion
Kelkaj japanaj kongresanoj skize kaj pasie prezentas sian hejmlokon per sakeo kaj lokaj diversaĵoj. (senpage)

22:00-23:00 Filmo-prezentado:"Etulo Issunboŝi"
Tiu estas japana, fama kaj antikva rakoto.

# Libroj aperintaj okaze de la kongreso

## Historio por Marfermi Estontecon

(Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.)

Pro la geografia proksimeco, Ĉinio, Japanio kaj Koreio intime inter-rilatis, sed pro tio foje konfliktoj okazis, interalie en la 19-a kaj la 20-a jarcento. Sed en la 21-a jarcento, kiam ni devas kunvivi amike, ni nepre devas havi komunan historion por la interkompreniĝo. Antaŭ du jaroj en la tri landoj la komuna histori-libro eldoniĝis en la respektivaj lingvoj, kaj nun aperis la Esperanta versio. Tiu ĉi libro estas vere epokfara ne nur en la historia mondo sed en Esperantujo.

HORI Jasuo

(KN 86)




# hajka angulo

sur glaciaĵo
facile kaj senhalte
roza langeto

(HIROTAKA Masaaki)

# Bonvolu viziti hejmpaĝon de la UK

Vi povas rigardi hejmpaĝon de la kongreso per <http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/espe/gheneralo.htm>. Nia papera kuriero Ondas Jokohamo havas nur unutonan koloron, sed en la hejmpaĝo vi povas rigardi kolorajn fotojn.

## novaj aliĝintoj

1846 Francesco BELLEBONO/ Vicolo Vaglietti 2, 27055 Cologno el Serio, Italio
1847 OKADA Fumiko/ Nakai-mati 3-13-11, Takasaki-si, Gunma-ken, 370-0852 Japanio
1848 Viŝnja Brankoviĉ/ Vienac J. Meŝtronica 49/VII, 31000 Osijek, Kroatio
1849 Nikao NANDOOHI/33 Iraj, Dowlatshad, Gharbi, Farid-Afshar, Zafar, Tehran, Irano
1850 Amhadreza MAMDOOHI/ 33 Iraj, Dowlatshad, Gharbi, Farid-Afashar, Zafar, Tehran, Irano
1851 Natale Riccardo PINORI/ Largo Missiroli, 13-I-00151, Roma, Italo
1852 Giovanna LICCIARDELLO/ Largo Missiroli, 13-I-00151, Roma, Italio
1853 WAKUI Shoutaro/ Fujimidai 4-5-10 Nekusutezi Kunitati 2-102, Kunitati-si, 186-0003 Japanio
1854 ZHAO Jianping/ Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia, Ĉinio
1855 ZHANG Ping/ Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia, Ĉinio
1856 Andy BLACK
1857 Daniel CULTHERT
1858 Sam GREEN
1859
1860 HIRAI Joko/ Motoyama-kitamachi 3-14-2, Higashinada-ku, Kobe-si, Hyogo-ken, 658-0003 Japanio
1861 JANG Kisu/ 704 Jongro 1 B/D, Kwanchol-dong, Jongro-ku, Seulo, 203-1103 Koreio
1862 YOON Nari/ Hyundae Dobong-gu Chang-dong Seoul, 203-1103 Koreio
1863 MARUYAMA Mio/ Watari-tyo, Mito-si, Ibaraki-ken, 310-0902 Japanio
1864 SUGIMOTO Mayu/ Ohizumimati 2-55-8, Nerima-ku Tokyo, 178-0062 Japaio
1865 SUGIMOTO Miyu/ Ohizumimati 2-55-8, Nerima-ku Tokyo, 178-0062 Japaio
1866 KAWABATA Yoshihiro/Kotobuti-so 11, Tanaka-Nishiuracho, Sakyo-ku, Kyoto-si, 606-8217 Japanio
1867 Magdalena FEIFICOVA/ Bernolakova 25/5 010 01, Zilina, Slovakio
1868 Kip CATES/ Univesity, 4-101, Koyamatyo-minami, Tottori-si, 680-0945 Tottori-ken

Je 14:00 de la 5-a de aŭg. la nombro de la partoprenantoj atingis **1882**.

Ondas Jokohamo

N-ro 4

2007-08-07, mardo

redakteja retadreso:

ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO

# Ĉu vi spertis tradician Japanion?

Karaj kongresanoj, ĉu vi ĝuis la tradiciajn artojn de Japanio? Vi spertis prezentaĵojn, kiujn eĉ japanianoj malofte spektas.

Nacia Vespero okazis la 5-an de aŭgusto en la Halo Zamenhof. Ĝin prezidis AGOO Takasi.

Unue oni prezentis *gagaku* (kortega danco kaj muziko). Akompanate de tradiciaj muzikiloj, kiujn ludis viroj en antikvaj kostumoj, dancis viro en luksa kostumo impone kaj solene. La titolo de la danco estis Ryou-Ou (la reĝo de Ryou).

Sekvis muziko ludata de junaj gemuzikistoj per kotooj (korda muzikilo) kaj ŝakuhaĉo (fluto el bambuo). "*Sakura* (ĉerizfloroj)" kaj aliaj du pecoj estis luditaj.

Fascinis la ĉeestantaron la tria prezentaĵo "sagi (egreto)". Dancistino YOSIMURA Kio prezentis soldancon akompanate de tradiciaj muzikiloj kaj kantoj ludataj de 13 viroj.

La lasta prezentaĵo estis tamburado de gestudentoj. Ili ludis tamburojn, fajfilojn kaj tintilojn kaj vigla ritmo skuis la korojn de la rigardantoj.

Post ĉiu prezentado oni havis kelkajn minutojn por foti la ludintojn. Tio ĝojigis la spektantojn, ĉar fotado estis malpermesita dum la prezentado.



prezentado de *gagaku* "Ryou-Ou"



ludado de kotoo

Jen voĉoj de la spektintoj:

"Ĉiuj prezentaĵoj estis interesaj, precipe tamburado de gejunuloj." (brazilano)

"Belaj spektakloj, sed sen kompreno. Mi ne povis bone sekvi la dancojn. Klarigo mankis." (franco)

"Kontrasto de kvieta malrapideco kaj rapida movo estis bona kaj impresa en la soldanco 'egreto'. (japano)

"Enhavo de la tri unuaj programeroj estis por mi nekomprena, iom tro tradicia kaj religiema, sed kiel turisto mi ĝojas, ke mi havis ŝancon ilin sperti. La muziko de kotoo jam estis pli vigla kaj la tamburoj gajigaj. Mi scivolas, ĉu japanoj elektante tian programon volis kontentigi sin, aŭ alilandanajn esperantistojn." André GROSSMANN (KN 528)

"Tre plaĉis! Mi ŝatas popoldancojn kaj ĉiam provas vidi ilin dum kongresoj. Mi eĉ kunportis al Japanio diskojn kun bulgaraj popolaj dancoj por doni al amikoj – tio estas pli bona donaco ol aliaj."

Kanjo Mitev KANEV (KN 105)

"Korta danco por mi, japano, ne estis interesa, ĝi estis eĉ enuiga (mi fakte iomete dormetis). Tamen spekti tiu-tipan spektaklon estas por plimulto la unufoja sperto, do certe spektenda. Plej ŝatinda al mi estis 'bujoodanco': ŝiaj movoj estis belaj, ĉarmaj kaj lertaj (ŝi estis fotinda en ĉiu momento). La parto kun tamburoj estis por miaj oreloj kutima, sed malgraŭ tio



japana danco "egreto"



en la fino, tamburado de junuloj

mi trovis la grupon energia kaj lerta. Tutcerte ĉiuj emociiĝis." IŜIKAŬA Kazuja (KN 728)

"Ambaŭ viraj kaj virinaj dancoj estis por mi novaj kaj interesaj. La muziko de tamburoj vekis imagon." Zygmunt LANGE (KN 929)

"Laŭ la opinio de karavano gvidata de mi la programero estis ege impona. Tutcerte ĝi montras la tutan riĉecon de Japanio. Mi persone estas en Japanio jam la sesan fojon kaj vidis multajn dancojn, sed la hieraŭaj estis la plej elstaraj."
Andrzej GRZEBOWSKI (KN 154)

"La danco kaj muziko *gagaku* estis por mi la unuafoja sperto. La japana danco – la plej malrapida inter dancoj ne nur por eksterlandanoj sed ankaŭ por japanoj ne ĉiam estas komprenebla. Mi pleje ĝuis la elegantan dancon, sed ne konas ĝian rakonton. Enhavo de la hieraŭa Nacia Vespero estas laŭ mi la plej bona el inter ĉiuj ĝis nun viditaj."
AIKAWA Setsuko (KN 253)

## Prezentado de la novaj honoraj membroj

**1. Endre DUDICH**

Naskiĝis en 1934. Eklernis Esperanton en 1962.

Pasintaj kaj nunaj postenoj en la neesperantista mondo: Laboris kiel geologo. Faris esplorvojaĝojn al Irano, Kubo kaj Kanado. Laboris en Parizo ĉe la Internacia Unio de la Geologiaj Sciencoj. Estas kandidato de tersciencoj en la Hungara Akademio de Sciencoj, profesoro pri geologio en la universitato de Sopron.

Pasintaj movadaj laboroj kaj postenoj: Tradukis el 20 lingvoj al Esperanto proksimume 1700 paĝojn, verkis en Esperanto 33 publikaĵojn kaj inter ili du librojn: *Ĉu vi konas la teron?* kaj *La lumo nutranta*, prelegis en kaj pri Esperanto en pluraj landoj, inkluzive de Brazilo, Francujo, Sanmarino, Rumanujo. Estis vicprezidanto de la klubo Konkordo en la 70-aj jaroj en Budapeŝto, ano de la geologia sekcio de ISAE, membro de la komisiono pri Scienca kaj Faka aplikado de Esperanto de UEA, vicprezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, Honora Prezidanto de HEA de 2006.

Li havas plurajn honorajn rekonojn de fakaj neesperantistaj asocioj kaj de sciencaj institucioj.

**2. KONISI Gaku**

Naskiĝis en 1934. Eklernis Esperanton en la aĝo de 13 jaroj.

Pasintaj postenoj en la movado: Prezidanto de la komitato de KLEG (Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj); ĉefo de la Redakta Komisiono de la *Nova Esperanto-Japana Vortaro*; konsiliano de Japana Esperanto-Instituto; membro de la Akademio de Esperanto.

Tradukoj el la japana: *Vilaĝoj en batalkampo* (temas pri Vjetnama Milito) de HONDA Katuiti (1970); *La Neĝa Lando* de KAWABATA Yasunari (1971); *Notoj pri la delto* de OKADA Haru (1972); *Nokto de la Galaksia Fervojo* de MIYAZAWA Kenzi (1994); *La Flambirdo* (bildrakonto) de TEZUKA Osamu (2001); kaj pluraj titoloj komune kun aliaj aŭtoroj, ekzemple *Hirosima-Nagasaki : Bilda dokumento pri la atombombado* (1979); *Postmilita japana antolo*gio (1988).

Orginalaj verkoj: *Vage tra la dimensioj*, kolekto de scienc-fikcietoj (1976); kaj pluraj titoloj komune kun aliaj aŭtoroj, ekzemple *Japana kvodlibeto* (1965).

Li verkis krome lernolibrojn, tradukis kantojn kaj estis aktiva plurkampe.

**(kontribuaĵo pri KONISI Gaku fare de kongresano)**

KONISI Gaku, pro malsaneto ne aperas kongreseje. Li estis plurloke menciita en la Internacia Kongresa Universitato (IKU).

En IKU-1, Amri WANDEL parolas, laŭ la fluo de astronomia temo, pri la traduko esperanten de *Nokto de la Galaksia Fervojo* de MIYAZAWA Kenzi, kaj ties tradukinto estis KONISI Gaku.

En IKU-5, GOTOO Hitosi parolos pri la *Esperanto-Japana Vortaro*, kies ĉefredaktoro li estis. (de SIBAYAMA Zyun'iti, KN 92)

## Informoj pri programeroj

**1. Medicinista vizito** al Rehabilitada Centro de Jokohamo

Ĝi okazos en **la 7-a tago, marde.**

Detalojn legu sur p. 3 de n-ro 3. Kolektiĝu ĉe la enirejo de la 1-a etaĝo de la kongresejo.

Hideki HARADA (KN 00219)
poŝtelefono: 080-5231-5616

**2. Esperantologia Konferenco**

Atentu!

La definitiva tago kaj horo de la Esperanto-logia Konferenco: Ĉiuj prelegoj okazos en 14:00-18:00 la 9an de aŭg., ĵaŭde,) en *Holder* (t.e. tute tial same kial montrite en la kongresa libero).

**3. Urĝa alvoko al ELDONISTOJ!**

Kiel kutime okazos dum la UK-programo "Libroj de la Jaro", en kiu vi havos okazon prezenti al la

publiko viajn novajn eldonaĵojn, aperintajn inter la lasta UK kaj la nuna. Ĝi okazos ĵaŭde la 9-an de aŭgusto en 10:30-12:15.

Se vi ankoraŭ ne anoncis vin, bonvolu urĝe tion fari, lasante mesaĝon ĉe la rendevua tabulo (KN 78), aŭ ĉe la libroservo, menciante kiujn novaĵojn vi prezentos. Claude NOURMONT (KN 78)

**4. Teatraĵo: Galileo**

Ĝi okazos en **18:30-19:30** en MIYAMOTO (Gubernia Muzika Halo), ne kiel skribite en Kongresa Libro.

**5. Junularaj Koncertoj: japana muziko, Asorti, Marimbo**

Ĝi okazos en 18:00-21:00, en **Kannai-halo**. Atente rigardu mapon.

## Kongresanoj Invitas

**1. Kolektiĝu VELANOJ!**

Kunlaborintoj de la japana reta versio *Vojaĝo en Esperanto-lando* kunvenu en la UK. Ankaŭ personoj, kies nomo aŭ verko aperis en *Vojaĝo*, kunvenu.

15:00-15:30, la 9-an de aŭg. ĵaŭde, en kongresa librovendejo (ĉe la aŭtoro Boris KOLKER)

Poste ni kune kun B. Kolker iru ien.

**2. E@I sinprezentos vendrede!!!**

Ĉu vi ion aŭdis pri *lernu!* (lernu.net)? Kaj ĉu vi scias, kiu organizo staras malantaŭ ĝi? Venu por konatiĝi kun Esperanto@Interreto – la organizo, kiu produktas utilajn kaj interesajn projektojn.

Vendrede, en *Lapenna* en 10:30-12:00 kaj same vendrede kadre de la junulara programo en ZAIM en 16:00-17:30 okazos prezento de E@I kaj *lernu!*.

La kunordiganto de E@I (Peter BALÁZ) kaj la ĉefprogramisto de *lernu!* (Jevgenij GAUS) rakontos al vi pli detale pri la organizo: historio, ĝisnuna agado, planoj, nunaj kaj planataj projektoj.

## Iru ankaŭ al ZAIM
**(subkongresejo *Eroŝenko* ĉe NIHON-Odori)**

**Interreto senpage en ZAIM**

Oni povas uzi komputilon kun konekto de interreto libere kaj senpage en ZAIM. Ĉar tie troviĝas 2-3 sendrata *LAN*, oni povas uzi ankaŭ sian. (09:00-21:00)

**Hodiaŭ, marde, la 7-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

13:00-13:45 Teatraĵo: "Feliĉo de unu talentulo"
Prezentas: gestudentoj de Sophia Universitato (Tokio).

14:00-16:00 Gustumu Japanion
Kelkaj japanaj kongresanoj skize kaj pasie prezentas sian hejmlokon per sakeo kaj lokaj diversaĵoj. (senpage)

22:00-23:00 Filmo-prezentado:"Etulo Issunboŝi"
Tiu estas japana, fama kaj antikva rakoto.

**Morgaŭ, merkrede, la 8-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

19:30-22:00 koncertoj
Prezentas: supermezlernejanoj, YOMITANZAN Kozue.
Koruso, danke al bedaŭrata s-ro NAKATA Teruo, kaj aliaj.

**Postmorgaŭ, ĵaŭde, la 9-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

14:00-15:00 Japanaj Ludoj: manlaboro kaj amuza ludo Ninin-baori (duopa jako)

15:15-16:15 Pupteatraĵo: "Kion faris sur mia kapon!?", "Huge Hanasaka, la florigisto".
Prezentas: Za Tonton

15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo, japanlingva prelego de OSIOKA Taeko

16:15-17:00 Film-prezentado: "La Patro" la originalon de KIKUCHI Kan (japana aŭtoro) filimigis brazilanoj en Esperanto.

21:30-23:30 Koncerto
Prezentas: 2 bandoj de super-mezlernejanoj

## LKK informas

**1. al ILEI**

Tuj post la solena fermo, speciala aŭtobuso foriros je 14:00 de la ĉefa enirejo de la 1-a etaĝo de la kongresejo por veturigi partoprenantojn al *Ranzan* por la ILEI-konferenco. Oni devas antaŭpagi 15 eŭrojn aŭ 2 400 enojn ĉe la ILEI-tablo apud *Hodler*

**2. Infanvartejo**

Venis al la vartejo. 4 infanoj en la 4-a, sabate kaj 18 en la 5-a, dimanĉe. B.v. utiligi Infanvartejon. Necesas subskribi en konsentilo.

**3. Ekskurso E4 (al Kawasaki)**

La horo de ekiro estas ŝanĝita: 08:00 → **08:30**

## raportoj

**1. Kunsido de Amerika Komisiono**

08-05, dimanĉe, okazis en *Nitobe* kunsido de la Amerika Komisio de UEA. Ĝin prezidis ĝia komisiito, José Antonio VERGARA el Ĉilio. Li prezentis la

ĉeestantajn komisionanojn kaj informis pri la agado de la komisiono en la lastaj monatoj. Li atestigis pri la renovigita hejmpaĝo <http://www.ameriko.org> kaj invitis al la 7-a Tut-Amerika Kongreso okazonta en 12-18 de julio 2008 en Kanado. Pluraj ĉeestantoj finance kontribuis al la kolektado de mono cele al ĉeestigo en la Tut-Amerika Kongreso de amerikanoj nepagipovaj.

Atilio ORELLANA ROJAS (KN 1559)

**2. Ĝemelaj Urboj**

08-05, dimanĉe, okazis la 4-a kunveno de Ĝemelaj Urboj. Ĉeestis pli ol 40 kongresanoj el Ĉinio, Belgio, Ĉeĥio, Koreio, Finnlando, Francio, Kubo, Italio, Nederlando, Japanio, Pollando, Germanio, Litovio kaj Nov-kaledonio. Renato CORSETTI kaj Maritza Gutiérrez GONZÁLEZ unue faris paroladon. Oni aŭskultis la jaran raporton de la projekto "Ĝemelaj Urboj" en 2006, faritan de WU Guojidug. Pieter ENGWIRDU, Zsófia KÓRÓDY, EGAWA Harukuni, Cwik MICHAEL kaj SUN Minĝiao en siaj paroladoj donis proponojn al evoluo de la projekto "Ĝemelaj Urboj". La kunveno finiĝis en amikeca interŝanĝo.

**3. Invititoj el Azio**

Kiam okazis la 50a UK en Tokio en 1965, nur 2 homoj venis el aziaj landoj krom Japanio. Kvankam la ekonomia kaj la politika situacioj ege ŝanĝiĝis, veni al Japanio estas ankoraŭ malfacile por esperantistoj el multaj landoj en Azio. Tial Japana Esperanto-Instituto (JEI) projektis inviti aktivulojn proprakoste. En la lasta decembro ni elektis 23 homojn el 11 landoj, el kiuj 20 sukesis veni al Jokohamo.

La 3an de aŭgusto kolektiĝis 13 invititoj, iliaj prizorgantoj kaj Invit-komitatanoj en la halo de Hotelo *Escal*. Tiu amika kunsido daŭris du horojn en la gaja etoso. Ilia motoo dum la kongreso estas: "Ĝoju, lernu, amikiĝu en la Esperantujo kaj dediĉu vin por la paca kaj harmonia mondo.



## novaj aliĝintoj

1869 Adair Areda VASCONCEKS/ ST-Chacnan 10-Brazlandia-DF Brazilo

1870 Shirlene Vazdete BARREINA/ Setor Tradicional Chacara N-o 10, Brazlandia, Brazilo

1871 Amelia Barbosa PINHEIRO/ Setor Tradicional N-o 10, Brazlandia-DF, Brazilo

1872 OGAWA Hirohiko/Tomioka 881, Inuyama-si Aiti-kn, 484-0092 Japanio

1873 Maruuc Sarastamo/ Finnlando

1874 SO Gilsu/ 178-7, Dongkyo-dong Mapo-ku, Seul, Koreio

1875 Eugenia Alma DE QUETZAL ALMAND/ Lively Ridge Road, Atlanta,GA30329, Usono

1876 NAKAI Hayashi/ Shiroyama 3-15-14, Odawara-si, Kangawa-ken, 250-0045 Japanio

1877 FUZIMOTO Kazuhumi/ Zibuki-tyo 17-8, Fukuyama-si, Hirosima-ken, 720-0816 Japanio

1878 FUZIMOTO Yumi/ Zibuki-tyo 17-8, Fukuyama-si, Hirosima-ken, 720-0816 Japanio

1879 FUZIMOTO Mayu/ Zibuki-tyo 17-8, Fukuyama-si, Hirosima-ken, 720-0816 Japanio

1880 KUDO Madoka/ Kamitu-mati 2504-3-201, Kurume-si, Hukuoka-ken, 830-0052 Japanio

1881 Taluikki SAARENYARI/ Finnlando


1882 OIKAWA Yukiko/ Koyamatyo-minami 3-117-201, Tottori-si, Tottori-ken, 680-0945 Japanio

1883 NIŜINO Airi/ Kitanosho-cho 119, Oumihatiman-si Siga-ken, 523-0806 Japanio

1884 KOMACU Masahiko/ 9-26-204, Ainosato 3-8, Sappro-si, 002-8073 Japanio

## Libroj aperintaj okaze de la kongreso

Japanio estas tre longhistoria kun hereditaj kulturaĵoj, sed samtempe tre moderna kun famkonataj aŭtomobiloj kaj elektraj aparatoj. Tiu ĉi libro eldonita memore al la UK kovras la tuton de Japanio, de la antikvo ĝis la hodiaŭo. Eltrovu Japanion por plene ĝui la vivon en Japanio. Aĉeteblas senimposte en la librservo de la UK. (900enoj)




## hajka angulo

sur glaciaĵo
facile kaj senhalte
roza langeto

(HIROTAKA Masaaki)

Ondas Jokohamo

N-ro 5

2007-08-09, ĵaŭdo

redakteja retadreso:

ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO

# Fakto estas "Okcidento super Oriento"

**prelegis TSUDA Yukio en la Solena Inaŭguro**

Bonan matenon. Koran dankon, ke vi invitis min. Mi elkore gratulas pro okazigo de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto.

Certe estus adekvate ĉi tie paroli Esperante, sed bv. permesi min uzi mian gepatran lingvon. Mi volas paroli pri la kongresa temo: "Okcidento en Oriento: Akcepto kaj rezisto".

Ĉi-jare inter januaro kaj majo mi instruis en universitato en Kalifornio kaj diversloke en Usono prelegis pri mia temo: hegemonio aŭ regado de la angla. Pri tiu sperto mi volas raporti al vi hodiaŭ.

La kongresa temo interese esprimas la streĉon inter Oriento kaj Okcidento. Okcidento ja profunde penetris en Orienton. Fakte Oriento multflanke okcidentiĝis. Ekzemple la vivstilo de ni japanoj klare montras tion. Ni alkutimiĝis al tio, manĝi *McDonald's* kaj trinki *Coca Cola*. Ni vestiĝas ankaŭ eŭropstile kaj loĝas eŭropstile. Tradiciaj japanaj loĝdomoj apenaŭ restas.

Kial Okcidento povis tiom penetri tra la tuta mondo? Unu kialo estas, ke okcidentanoj kredas sian kulturon kaj civilizon "universala" kaj altrudis per milita kaj ekonomia povo tion al la tuta mondo. Okcidentanoj evoluigis sciencon kaj teknikon, invadis la tutan mondon kaj asertas, ke la tuta mondo iĝu okcidenta. Per tia t.n. "okcidenta universalismo" kaj "kultura imperiismo" la tuta mondo okcidentiĝis. Tiusence, "Okcidento super Oriento" pli ĝustas ol "Okcidento en Oriento". Oriento devis akcepti okcidenton. Tia okcidentigo okazis en la tuta mondo dum la lastaj 500 jaroj. Moderniĝo fakte signifas okcidentiĝon de la tuta mondo.

Sed kiam orientanoj rimarkis, ke ili perdiĝas en troa okcidentaniĝo, ili komencis rezisti. Orientanoj klopodis regajni suverenecon. Sed ekzemple en Japanio, post la Dua Mondmilito, estiĝis la regado de "Usono super Japanio". Tio daŭras ĝis hodiaŭ. En la lastaj 60 jaroj, Japanio pli kaj pli usoniĝis.

Hodiaŭ oni parolas pri tutmondiĝo. Tio fakte estas usoniĝo. Usonaĵoj iĝis monda normo: Ekonomie la dolaro kaj komunikade la angla.

Ĉu ni senreziste akceptu tian situacion? Ĉu ne indas pensi pri egaleca komunikado kaj lingva egaleco? Nun la angla regas super ĉiuj aliaj lingvoj. Tiel anglalingvanoj havas grandan avantaĝon, dum aliaj spertas "lingvan diskriminacion".

Mi diris al usonanoj, ke la regado de la angla kaŭzas "lingvan diskriminacion". Ili energie kontraŭis min, dirante, ke la mondo elektis la anglan. Kio estas la problemo?

Mi refutis: "Nun ni ne havas la liberon NE elekti la anglan." Mi atentigis, ke la granda potenco de la mondangla malebligas la uzadon de aliaj lingvoj. Sed por usonanoj memevidentiĝas, ke la angla estas la monda lingvo. Ili ne volis agnoski la ekziston de la problemo.

Sed la reago de la usonanoj al miaj atentigoj jenis: "Oni bezonas la anglan por travivi. La angla estas ŝlosilo al sukceso kaj prospero."

Mi refutis: "Ĉiu lingvo kaj kulturo estas nemalhavebla kaj protektindas."

Ili ree kontraŭis: "Lingvo kaj kulturo ĉiam ŝanĝiĝas. Krome, eĉ se lingvo perdiĝus, kulturo restas."

Mi denove refutis: "Lingvo ne estas distranĉebla de kulturo kaj identeco."



Tiel la diskuto daŭris senfine. Ŝajne mia vidpunkto ŝokis usonanojn. Sed la fakto mem, ke ili energie kontraŭis, estas signifoplena. Kiusence signifonplena? Ilia kontraŭstaro al mia argumento fakte montras, kiom gravas por ili la regado de la angla. Estas danke al tiu fakto, ke ili tenas sian avantaĝan pozicion en la mondo.

Mia starpunkto kontraŭas ĝuste tion. Do estas tute nature, ke anglalingvanoj malakceptas kritikon, kiu minacas ilian pozicion kaj profiton. Mi ankaŭ menciu alian gravan aspekton. Al multaj anglalingvanoj simple mankas la moralo de egaleca komunikado. Tial ili rigardas la regadon de la angla kiel naturan fenomenon.

Por forigi tian malĝustan konscion, necesas severa rezisto. Mi mem klopodas rezisti verkante kaj prelegante pri la problemo de la angla regado.

Ankaŭ la Esperanto-movadon, mi rigardas kiel movadon kontraŭ la mondangla. La ekzisto de Esperanto jam profunde pridemandas la regadon de la angla. En mia hodiaŭa parolo mi intencis konsciigi, ke "Okcidento en Oriento" fakte signifas "Okcidento super Oriento". Nia defio estas egaligi rilaton inter Oriento kaj Okcidento. Por tio simpla akcepto ne sufiĉas. Pli gravas rezisto.

Kaj por tia rezisto la Esperanto-movado povas ludi gravan rolon. Ekzemple esperantistoj povas kontribui al reformado de lingva instruado. Mi esperas daŭran evoluon de via agado.

Dankon pro via aŭskulto.

(tradukis kaj interpretis KIMURA Gorou)

## Nova estraro de UEA elektita!

Probal DAŜGUPTO estas nova prezidanto de UEA, laŭ elekto de la Komitato en la kunsido, lunde en Jokohamo.

Aliaj estraranoj estas Ranieri CLERICI kaj Claude NOURMONT, ambaŭ vicprezidantoj, kaj nova ĝenerala sekretario estas Barbara PIETRZAK. Pliaj tri estraranoj estas Loes DEMMENDAAL, HORI Jasuo kaj José Antonio VERGARA, tiel ke la tuta nombro estos sep estraranoj.

En la ĵaŭdo, de la UK en Jokohamo, la nova estraro prezentos sin dum matena kunsido.

Raportas Ulla LUIN (KN 80)

## Informoj pri programeroj

1. **Aŭtoraj duonhoroj** okazas laŭ la programo de la Kongresa Kuriero N-ro 1 (ne kiel indikite en la kongresa libro).
   Aldone, estos duonhoro en Paul GUBBINS 14:30-15:00, ĵaŭde, la 9-an de aŭg.
2. **IKU-8 (Zhu)** okazos en 14:15-15:15, vendrede, la 10-an de aŭg. (ne en 14:00-15:00, ĵaŭde, la 9-an) en la salono *Hodler*.
3. **SAT** (sennacieculoj)
   13:00-14:00 vendrede, la 10-an de aŭg. en *Hodler*
4. **Jenaj koncertaj programeroj** okazos ĵaŭde, en *Miyamoto* (Gubernia Muzika halo)
   Piano koncerto de Tazima Mayuko en **15:00-16:00** (atentu: tempo ŝanĝita)
   Koncerto de *Asorti* en 18:30-19:30
   *Mozart Ensemble Orchestra* en **19:45-21:00** (atentu: tempo ŝanĝita)

## Kongresanoj Invitas

**Amikaro Bruno Gröning**

La unua prelego jam marde okazis de M. Knöringer en la temo: "Ŝanĝo per spiritaj fortoj medicine pruvebla".

Profundigaj prelegoj sekvos ĵaŭde je la 9:00 kaj vendrede je la 10:45.

## raportoj

**1. Fervojista kontaktkunveno**

08-05, dimanĉe, okazis la fervojista kontaktkunveno, kie partoprenis 30 kongresanoj el 10 landoj. La vicprezidanto de IFEF gvidis la kunvenon, kaj li parolis pri la organizo de IFEF, pri ĝia historio, kaj pri la 100-jariĝo de la organizaĵo. Poste li raportis pri la lasta IFEF-kongreso okazinta en Parizo en majo 2007.

Poste YAMAMOTO Akiya faris fakprelegon pri la japanaj fervojoj. Post ĝi okazis vigla parolado pri la fervojista Esperanto-movado, kaj pri la akurateco de japanaj fervojoj.

István GULYÁS (KN 1249)

**2. "Poezia Vespero" vekis emocion**

08-05, dimanĉe okazis "Poezia Vespero" en *ZAIM*, kaj kolektiĝis 220 personoj plenplenaj en la ĉambro, kiuj inkluzivas pli ol 50 ne-esperantistojn japanajn. Unue, prezentiĝis tri poetoj: Spomenka ŠTIMEC (anstataŭ Geraldo MATTOS), István ERTL kaj TANIKAWA Shuntaro (tre fama poeto en Japanio), kaj la poemojn tradukis IZUMI Yukio, KITAGAWA Hisasi, USUI Hiroyuki. Due, la tri poetoj parolis sian impreson reciproke.

Tiu prezentado ege vekis emocion en ĉeestantoj. Notinde estas, ke havis kontenton ankaŭ tiuj, kiuj ne komprenas Esperanton. Iu japana ne-esperantisto konfesis, ke ŝi ĝis nun pensasdis, ke Esperanto estas mortinta lingvo, tamen nun eksciis, ke ĝi ja estas vivanta lingvo.

**3. Skolta Esperanto-Ligo (SEL)**

08-05, dimanĉe, okazis la kunsido en *Nitobe* kun 10 partoprenantoj el 4 landoj – ne nur skoltoj sed ankaŭ interesitoj. Ili prezentis kaj diskutis, kio estas SEL, kio estas intereso pri skolta kaj Esperanta movadoj, kiel servi por ambaŭ movadoj k.a.

Kaj 08-06, lunde, okazis la dua kunsido en salono de la etaĝo 1 kun 5 partoprenantoj el 4 landoj – nur skoltoj kaj gvidantoj diskutis plu pri aktivado de SEL.

**4. Kleriga Lundo** (antaŭtagmeze de la 6a, lunde)

**4.1 Esperanto laŭ denaska metodo**

Preskaŭ ĉiuj gepatroj, kiuj scipovas Esperaton, deziras ke iliaj gefiloj lernu kaj parolu la lingvon. Denaskaj esperantistoj ne estas maloftaj en nia movado. Sed ĉiam estas la demando kiel instrui Esperanton al niaj infanoj. Renato CORSETTI enkondukis pri la aktivaj kaj pasivaj denaskuloj menciante kelkajn ekzemplojn. Amri WANDEL parolis pri siaj spertoj instrui infanojn kaj menciis diferencojn inter metodoj praktikataj de li mem. François LO JACOMO kaj aliaj partoprenantoj ankaŭ kontribuis per prezantado kaj parolado pri siaj spertoj kaj la temo.

**4.2 Azia Komuna Historio**

Partoprenis ĉ. 100 kongresanoj en *Ludovikito*. LEE Chong-Yeong, SATOO Morio kaj YU Tao prelegis pri la bezono de Komuna historio en Azio, pri traduko en Esperanto fare de 40 volontulaj esperantistoj en Azio: la Esperanta versio *Historio por malfermi Estontecon – Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio*. La partoprenantoj rekomendis meti la kunsidon "Histrio por paco" en la programeron de Kleriga Lundo de la venonta UK.

LEE Chong-yeong (KN 54)

**4.3 Azia ekonomio**

La ĉambro estis plenplena por diskuti. A.G. Rao el Barato (Hinda Unio), JIANG Limin el Ĉinio, YAMASAKI Seikô kaj OOBA Atsuo el Japnio kaj LEE Chong-Yeong el Koreio prelegis pri ekonomio en sia lando. Dum la diskuto, bezono de "Bonfarta indekso", anstataŭ ordinara malneta enlanda produkto en dolaro.

LEE Chong-Yeong (KN 54)

**4.4 retpaĝaroj**

Janko LUIN skizis historie la aliron de <esperanto.nu> al <esperanto.org>. Francesco MAURELLI: kiel uzi retpaĝojn por informi? (ekstrakto de iama prelego). Bone organizitaj prelegetoj; Bertilo WENNERGREN: konsiloj – listigotaj sur la retejo; iu koreo: <esperantujo.com> en demonstro.

Debato pri *Mysql*, *yahoo* kaj *google* kun "unikodo", ... J. Luin (KN 1311), B. Wennergren (KN 1687), F. MAURELLI (KN 1496)

**4.5 Pacifiko**

Gvidanto de la kunveno: Mark FETTES (Kanado)

Podianoj: Bradley MCDONALD (Nov-Zelando), Léna LEROY (Nov-Kaledonio), Sergey ANIKEEV (Vladivostoko/Rusio), José Antonio VERAGARA (Ĉilio)

"Ĉu Pacifika Oceano kunigas aŭ dividas?"

Kunvenis ĉ. 40 personoj. Oni konstatis, ke jam de la pratempo Pacifiko estas regiono de migrado kaj intermiksaĵo de multaj diversaj kulturoj. Krome vivas centoj da indiĝenaj popoloj kun multaj diversaj lingvoj. Fakto estas, ke Pacifiko kunigas tre riĉajn landojn kaj multajn malriĉajn landojn. Ekestis demando, ĉu Esperanto havas rolon en rilato al indiĝenaj popoloj.

Mark FETTES rakontis pri "indiĝena programo", en kiu oni kontaktis indiĝenajn reprezentantojn de diversaj landoj kaj instruis Esperanton.

**4.6 Esperanto-movado en Azio**

LEE Jung-kee (Koreio) raportis pri la stato de la mondo en Azio kaj pridiris okazintajn eventojn kaj jam tradiciajn renkontiĝojn, ekz. Azia Kongreso, Komuna Seminario kaj Kursaro inter Japanaj kaj Koreaj gesamideanoj.

Reza TORABI raportis skize pri la lastaj eventoj de la movado en Irano kaj Afganio.

Dagva Gereltogtokh raportis pri mongola movado kaj ties stato. Rajendra MANADHAR raportis pri la movado en Nepalo. Shabbir Ahmadd SIAL el Pakistano raportis pri la stato de la movado kaj agadoj de pakistanaj esperantistoj.

Saidnabi SAIDILĤOMZODA el Taĝikio parolis pri siaj agadoj kaj la movado en Taĝikio.

**4.7 Kulturaj diferencoj**

Interesa temo estas interese prezentita de prelegantoj kaj ankaŭ de publiko.

Ja oni povus pritrakti ĝin inter pluraj homoj, sed plej verŝajne oni kunsentas ke plej grave rolas individua familio, eduko kaj persona disponebleco por kompreni kaj fronti la kulturajn diferencojn.

**4.8 Aziaj religioj**

Budhismo, konfuceanismo, Oomoto kadre de ŝintoismo, ŭonbulismo: ĉi tiuj temoj estis prezentitaj al nombrega ĉeestantaro de bonkvalita prelegantaro.

Tamen tiuj klarigoj enkondukis en tre interesan sferon, de plimulto nekonatan, kio tutcerte tiklis ĉies scivolemon kaj malfermis kroman pordon al komprenemo de aliaj homaj kulturoj. Plej esperenble la prelego pliprofundigos siajn sciojn pri iliaj religioj, kies komuna celo estas akompani la homon laŭ vivovojo pavimita de pacamaj, humanecaj kaj bonaj pensoj.

Elda DOERFLER (KN 486)

# LKK informas

**1.** En inaŭguro, la urbestra saluto, anstataŭlegita de la vicestro, menciis la jaron 1859 kiel la jaro de malfermo de Jokohamo al la ekstera mondo, en Japanio tiam fermita al aliaj landoj, kaj baldaŭos ties 150-jariĝo. La bonveniga parolado mia, de la LKK-estro rimarkigis, ke tiu jaro estas la naskiĝjaro de L.L. Zamenhof, kaj Japanio movade akceptis Esperanton antaŭ 101 jaroj.

**2.** En la 7a de aŭg., marde, aliĝintoj nombris 1886. La nombro de aliĝintoj loĝantaj en Japanio atingis 1003, do superis tiun de la 50a UK en 1965 je 10.

SIBAYAMA Zyun'iti,

# Iru ankaŭ al ZAIM
## (subkongresejo *Eroŝenko* ĉe NIHON-Odori)

**Hodiaŭ, ĵaŭde, la 9-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

14:00-15:00 Japanaj Ludoj: manlaboro kaj amuza ludo Ninin-baori (duopa jako)

15:15-16:15 Pupteatraĵo: "Kion faris sur mia kapon!?", "Huge Hanasaka, la florigisto". Prezentas: Za Tonton

15:30-16:00 Prelego el Hiroŝimo al la mondo, japanlingva prelego de OSIOKA Taeko

16:15-17:00 Film-prezentado: "La Patro" la originalon de KIKUCHI Kan (japana aŭtoro) filmigis brazilanoj en Esperanto.

21:30-23:30 Koncerto
Prezentas: 2 bandoj de super-mezlernejanoj

**Morgaŭ, vendrede, la 10-an de aŭgusto**

13:00-19:00 Ekspozicio

14:00-15:30 Ŝamisena kurso
Ŝamiseno: tri-korda japana tradicia muzikilo. Oni povos provludi ĝin. Gvidos TAZIMA Mayuko.

15:30-16:00 Prelego: El Hiroŝimo al la mondo.

21:30-22:30 Danc-kurso: *ĉa-ĉa*, tango, valso ktp.
Gvidos Leo SAKAGUCHI kaj Cosima BREITENSTEIN

22:30-23:30 Koncerto Gvidas TAZIMA Mayuko

23:30-ĝismatene Diskejo kaj Babilejo
Diskludisto Leo SAKAGUCHI

## 横浜市民の皆さんへ

8月4日～11日まで第92回世界エスペラント大会がパシィフィコ横浜で開かれています。この大会に世界の60カ国から2000人が集まって，共通の言葉エスペラントを使って交流しています。

(Ĉi tiu mesaĝo japanlingva estas adresita al ne-esperantistaj japanoj informe pri la UK.)

## novaj aliĝintoj

1859 BAKSA Jozef/ Hungario

1885 Maria APARECIDA/ Rua Doraci, n-ro 90, Bom Retiro, San Paulo - SP, Brazilo

1886 Paulo César PEREIRA/ Rua Doraci, N-ro 90 Bom Retiro, San Paulo - SP, Brazilo

## Reeĥoj de neĉeestantoj interrete

**1. el Germanio**

Mi tre volonte dankas al vi pro la *Ondas Jokohamo*, kiujn mi legas interrete kun granda intereso. Per tiuj oni ankaŭ povas partopreni malrekte je la nuna UK en via bela urbo...

Klaus-Peter BIBIKO (Magdeburg)

**2. el Finnlando**

Estas vere granda plezuro sekvi hejme en *Turku* kongresajn okazintaĵojn en Jokohamo pere de la *Kongresa Kuriero*. Regas sento, ke mi mem ĉeestas. Kompletigas vian laboron bonege la elsendoj de Pola Radio, kiu donas facile palpeblan bildon pri aranĝoj en la 92-a UK en Japanio sur ĉemikrofona tereno. Amikan saluton al ĉiuj ĉ. 2000 gekongresanoj.

Jorma AHOMÄKI


# Libroj aperintaj okaze de la kongreso

### *Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo*

verkita de Ĵuniĉi SAGA
tradukita de Judyta YAMATO

Libro pri malnova Japanio

Jen interesa kolekto de rakontoj de maljunaj homoj vivantaj en orienta japana urbeto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en jaroj inter la fino de la 19a jc ĝis 80-aj jaroj de la 20a jc. Inter la rakontantoj troviĝas tinkturisto, produktisto de tofuo, entreprenisto, rizvendisto, rivera transportisto, gejŝo, instruistino, fiŝisto … entute pli ol 50 personoj.




Ĉiuj tiuj homoj konis malnovan Japanion, spertis ŝanĝojn, kiujn alportis modernigo, kaj ekkonis abundecon.

3 900 enoj

# hajka angulo

Varmeg' ŝvitigas!
En salono tamen La
prelego bonas.

Peter HAUGE (KN 334)

Ondas Jokohamo

N-ro 6

2007-08-10, vendredo


redakteja retadreso:

ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO

# Salutmesaĝoj al la kongresanoj

**nova prezidanto de UEA: Probal DAŜGUPTO**



Estimataj geamikoj:

Mi estas estimanto de la amikecoj. Mi salutas vin en la nova rolo de via prezidanto, kiu havas la privilegian devon konstante aŭskulti vin. Esperanto estas specife amika kaj aŭskultema lingvo. Ni donis unikan formon al nia helpemo ekde 1914. Dum la Unua Mondmilito ni peris mesaĝojn, manĝaĵojn, medikamentojn inter la militantaj landoj. Ĉu nur dum milito aperas tiaj urĝoj? Ne! Ĉiam ekfajras krizaj bezonoj, ĉu pro subita tertremo ie, ĉu pro konstanta nutraĵomanko aliloke. Niaj helpemaj komunik-rimedoj devas ĉiam esti pretaj aŭdi la petojn de akutaj bezonantoj kaj trovi kapablulojn, kiuj tuje kaj taŭge fajrobrigados la fajrojn – precize kiel dum militoj.

Ĉu tia ĝeneralega, skolta helpemado---okupiĝanta pri viktimoj de inundoj, de malsategoj, de tertremoj – estas vere prioritata en movado por neŭtrala mondlingvo? Ni jam respondis tiun demandon en 1914. Jes ja.

Ni estas helpema lingvanaro; ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunikreton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko. La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn instituciojn, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj estontecon de la zamenhofa lingvo. Venas 2008, kiun UN deklaris la Internacia Jaro de la Lingvoj; kaj ni centjariĝos! Vi, kiuj kongresas, kaj precipe tiuj inter vi, kiuj staras ĉe la sojlo de UEA kaj ne en nia anaro, bonvolu ja aliĝi al la Asocio kaj kunagi kun ni! Vi trovos, ke ni helpas atingi ankaŭ viajn celojn.

# raportoj

**1. Kleriga Lundo** (08-06, antaŭtagmeze)

**1.1 Lingvaj festivaloj**

Dennis KEEFE tre detale klarigis la metodikon malantaŭ organizado de lingvaj festivaloj. Tiaj okazas jam en multaj landoj kaj proponas bonajn eblecojn prezenti Esperanton al la publiko. Sed la ideo, ke esperantistoj mem okazigu prezentadon de aliaj lingvoj, ŝajnas tempo malŝparado. Bude partopreni jes – organizi ne!

José Antonio VERGARA proponis, ke oni havu lingvan festivalon por lokanoj okaze de UK-oj, kio montrus kiam subteno al lingva kulturo. Tia ideo eventuale estis taŭge adaptebla.

**1.2 Kiel recenzi**

La seminarion gvidis Paul P. GUBBINS helpe de Anna LÖENSTEIN kaj DOI Ĉieko.

P. Gubbins unue donis al ni ses demandojn: **1.** Ĉu vi legas recenzojn? **2.** Ĉu vi aĉetas librojn surbaze de recenzoj? **3.** Kial recenzi? **4.** Kio estas bona recenzo? **5.** Kion enhavas bona recenzo? **6.** Kiajn karakterizaĵojn posedas bona recenzisto?

Tiujn demandojn ni diskutis en kvin grupoj po 6-12 homoj. Poste sekvis vigla diskuto, lerte prezidata kaj direktata dum kiu ĉiu grupo prezentis siajn respondojn. Fine P. Gubbins disdonis foliojn kun konsiloj de Marjorie BOULTON pri la arto recenzi (el *Esperanto* de UEA, aprilo 1988) kaj ekzemploj de recenzoj verkitaj de la tri gvidantoj.

Montriĝis, ke la konsiloj de M. Boulton tre similis al la konkludoj de nia diskuto. P. Gubbins, kiel bona instruisto, eble celis ĝuste tion: Ni pli bone absorbu la materialon, mem trapensante ĝin.

Skribante ĉi tiujn vortojn mi sentas min kvazaŭ

recenzanto de la seminario, do mi esperas, ke laŭ kelkaj el niaj konkludoj mi prezentas la esencon de la afero kaj opinion laŭeble objektivan.

Edmund GRIMLEY EVANS (KN 1469)

**2. Kvar subkomitatoj** (08-06, lunde)

**2.1 Financo**

En la kunsido, Yves BELLEFEUILLE gvidis la diskuton, kun helpo de estrarano Ans BAKKER. Temis pri financa raporto, buĝeto pri 2008, kotizoj por 2008 kaj membro-varbado, kaj la direktoro Osmo BULLER respondis al demandoj.

**2.2 Eksteraj rilatoj**

En la kunsido Ranieri CLERICI estis gvidanto kun helpo de Renato CORSETTI. Estis diskutoj pri la reprezentiĝo de UEA ĉe organoj de UN kaj Unesko. En la jaro 2008, la temo de UN estos pri lingvoj, kaj necesas pripensi la rolon de Esperanto en tio.

**2.3 Informado**

Jukka PIETILÄINEN gvidis la kunsidon pri informado, kun vigla diskuto pri la eblecoj kontakti amaskomunikilojn kaj pri bezono de materialo en interreto por tiu celo. Ankaŭ estas bezono de pli da scio pri amaskomunikiloj loke kaj lande en ĉiuj landoj.

**2.4 Edukado**

La kunsido estis gvidata de Atilio ORELLANA ROJAS, kaj temis pri edukado, ĉefe pri ekzamenoj.

Pliaj subkomitatoj estos traktitaj en la komitatkunsido vendrede. Ulla LUIN (KN 80)

**3. Azia Agado**

08-06, lunde okazis la kunsido. Ĉeestis pli ol 100 inkluzive de 10 reprezentantoj.

Komence HORI Jasuo parolis pri mallonga historio kaj la projektoj de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado). Poste raportis 11 landaj asocioj pri jenaj aferoj :

1. Stato de la asocio kaj organizo
2. Movado en 2006-2007
3. Solvendaj problemoj
4. Agadplano por 2007-2008

Laste restis 60 minutoj kaj okazis diskutoj kun demandoj, rekomendoj, kritikoj ktp kaj fine la prezidanto de KAEM konkludis:

1. Sukcesigu la AK (11-15 de februaro 2008 Bangaloro, Barato = Hinda Unio)
2. Laboru por plivigligi la movadon en Bangladeŝo, Srilanko (profitante la AK) kaj Filipinoj (jam ĝerminta)
3. Dum la UK amikiĝu unu la alian, ĉar tio estas la plej granda motoro de nia movado.

HORI Jasuo (KN 86)

**4. Landa Agado**

08-07, marde, okazis la kunveno en *Lapenna*, en kiu partoprenis pli ol 30 kongresanoj, kiuj aŭdis la raportojn de reprezentantoj de landaj asocioj. Inter ili menciindas la raportoj de la franca reprezentanto, tial ke tiu ĉi landa asocio rekonatas pro elstara agado aparte en la informa kampo. Entute estis 16 oficialaj raportoj plus aliaj de ne oficialaj reprezentantoj. Oni instigis al daŭra atento pri gravaj taskoj kiel reprezentiĝo de la landaj asocioj dum UK.

La funkciado de la listo pri landa agado, la informa laboro en la koncernaj landoj, kaj la venontjaraj eventoj por loke celebri la UEA-centjariĝon lige al internacia jaro de la lingvoj, interalie.

Mariza GUTIÉRREZ (KN 75)

**5. La Tago de la Lernejo**

08-07, marde okazis la kunsido en *Ludovikito*. Post la malferma saluto (Mihau TRIFOI: ILEI) kaj la salutoj nome de la japana ILEI-Sekcio (Tieko ISIKAWA), de AIS (Mauro LA TORRE), de IEI (Atilio ORELLANA ROJAS) sekvis serio de 14 prelegoj.

Oni parolis pri "Esperanto-Kurso kiel oficiala lernobjekto e n lernejo" (Takesi SIMATANI), pri "Unika instruado de Esperanto-kurso" por kompreni alilandajn homojn kaj kulturojn (Ricuko HUĜIMOTO), pri la "Altlerneja Esperanto-Agado en Liaoning-provinco de Ĉinio" (WU Guojiang), pri "Esperanto-instruado en Koreio" (LEE Jung-kee) parolis pri "Instruado de Esperanto en Irano" (Reza TORABI), pri la sperto "instrui Esperanton en Eŭropo, en Ĉinio" kaj en Hinda Unio (Dennis KEEFE).

Estis prezentitaj "Kelkaj eŭropaj instru-projektoj de Esperanto" (Mihai TRIFOI), la projekton "Lingvolanĉilo" ("*Springboard*", Paul GIBBINS kaj "La rolo de internaciaj instru-projektoj en Herzberg, la Esperanto-urbo" (Zsofia KORODY), la projekto "Esperanto per rekta metodo" (Stano MARĈEK) kaj la metiejo de edukado.net (d-ro Katalin KOVÁTS)

La Tago de la Lernejo finiĝis per kvar lastaj prezentoj: "Referenckadro" (KER) kaj memtaksado laŭ la eŭropaj normoj (Katalin KOVÁTS "Novaj ILEI-LIEA ekzamenoj laŭ la Referenckadro de la konsilio de Eŭropo" (Zsofia KORODY), la evoluo de la projekto "lernu.net" (Bertil WENNERGREN) kaj "BEK – Nova Ekzercaro pri Sufiksoj kaj Prefiksoj" (Dennis KEEFE).

La Tago de la Lernejo okazinta ĉi-jare en Jokohamo estis bona nova okazo por interŝanĝo de sperto por multaj Esperanto-instruistoj

Mihai TRIFOI

**6. Ekskurso al Muzeo de *Ghibli* kaj la urbodomo de *Mitaka***

08-08, merkrede. Partoprenis 20, invitite de la urbo Mitaka en Tokio. Ĝuinte la muzeon pri la animacia mondo, ni vizitis ankaŭ la urbodomon de *Mitaka* por renkonti la urbestron. Ŝi menciis la civi-

tanan agadon de urbanoj pri internacia amikeco, kaj akcentis la signifon de la monato aŭgusto, kiam atombomboj eksplodis en Hirosima kaj Nagasaki en 1945, por ke esperantistoj kontribuu por mondpaco.

NAKAMURA Daishin (KN 464)

**7. Rostbankedo**

08-08, en ekstera kuirejo de la amasloĝejo sub serena ĉielo okazis rostbankedo ekde 18:30. Bongustaj rostitaj legomoj, viandoj kaj nudeloj estis enmetitaj en apetitoplenajn internaciajn stomakojn de 30 partoprenantoj el 9 landoj sub amika kaj gaja etoso.



**8. Raporto el ZAIM kaj Kannai-Halo**

En 90-minuta **Enkonduka Kurso** de Esperanto partoprenis 40 personoj en 08-05, dimanĉe, kaj 32 en 08-06, lunde.

En **Vegetara Lunĉo** partoprenis 50 en 08-05, dimanĉe.

En **Poezia Vespero** partoprenis 220 en 08-05, dimanĉe. Iuj ne povis trovi sidlokon, kaj do starante aŭskultis entuziasme.

En **Junulara Bankedo** partoprenis 62 en 08-06, lunde. Inter ili 20 bankedis en apuda taverno pro tro multa partoprenantaro.

En **Koncerto "Muzike Interkulturi"** en Kannai-Halo en 08-07, marde, ĉeestis 260. La ĉeestantoj estis tiel multaj, ke ili ne povis trovi sidlokon. Inter ili 80 estis ne-esperantistoj.

## Kongresanoj Invitas

**1. Muzika Esperanto-Ligo**

Dum sukcesa jarkunveno estas decidite aperigi la bultenon *Muziko* trifoje jare por membroj. Ĝi inkluzivos la muzikon por kantemuloj ĉe 93a UK en Roterdamo. Por membriĝi nun la kosto estas 800 enoj aŭ EŬR 5.00.

Kontaktiĝu kun Jennifer BISHOP KN 177

**2. Invito al "Rondo UK-n pripensi"**

Ni kredas, ke vi estas ĉiam sufiĉe kontentaj de UK-programeroj; ni tamen imagas, ke vi ŝatus esti ne sole "sufiĉe", sed ankaŭ "plene" kontentaj dum la UK-semajno. Por atingi tion, ni devos fari ion kaj tiucele ni lanĉis kune "Rondo UK-on pripensi". Tial ni deziras, ke ankaŭ vi aliĝu al la rondo por kune diskuti nian komunan interesaĵon.

Ni aranĝos fondkunsidon de la Rondo laŭ jenaj detaloj: ni invitas vin afable en ĝi partopreni.

Loko: 5-a etaĝo, ĉe la Rendevua tabulo

Dato/horo: en la 10-a, vendrede, 17:00-18:00

## Korektoj

1. En la raporto de "Amerika Komisiono" jena hejm-paĝo estis menciita (n-ro 4): http://www.amerika.org. Ĝi estu "**http://www.ameriko.org**".
2. Mi petas korekton rilate *Ondas Jokohamo n-ro 5*, p. 2, kongresanoj invitas: Amikaro Bruno Gröning. La temo de la prelegoj estos "**saniĝo per spiritaj fortoj**" kaj ne "ŝanĝo".

Detlef MEIER (KN 961)

## Informo de UEA

**Kongresa Libroservo estas ne nur butiko, sed ankaŭ speco de ekspozicio**

Ionel ONET (libroservisto de UEA)

Ĉi tio estas mia sesa UK en kiu mi funkcias kiel libroservisto. Mi esperas ke ankaŭ tiu ĉi kongreso estos sukcesa ne nur por la kongreso mem ĝenerale sed ankaŭ pro la libroservo.

Ni devas pensi pri la fakto, ke al Japanio venas preskaŭ unu tuno kaj duono da libroj pli ol mil titoloj eble 180 skatoloj el ne nur Nederlando sed ankaŭ el aliaj landoj. Kongresa libroservo de UEA estas ne nur butiko, kie oni povas aĉeti, sed estas ankaŭ speco de ekspozicio. Ĉi tie oni vidas kvaronon de la titoloj, kiuj estas el nia librostoko.

Principe ankaŭ ĉi-jare ni portis tre varian elekton de titoloj. Sed en tiu ĉi jaro ni ankaŭ konsideras la landon de la kongreso. Ni havas apartan kategorion de japanaĵoj kaj pli ol kutime ni havas titolojn kiuj rilatas al Azio kaj al Pacifikoj.

Mi atendas vin en la libroservo!

## Revenis viva de la pinto de Fuĵi-monto!

Daniel XAVIER HADDAD (KN 1544), partoprenin-ta en la Tuttaga Ekskurso E7 al Fuĵi, kaj mistere malaperinta ien en la monto-mezo, feliĉe revenis senvunda. Daniel, tute indiferenta pri la fakto, ke multaj kongresanoj cerbumadis pri lia foresto kaj zorganto eĉ iris al la monto, montris sian figuron en la Gubernia Muzika Halo. Jen estas lia pardonpeto.

"Miaj karaj, estas ĉio en ordo. Kaj mi vere petas

pardonon pri tio, ke vi ĉiuj prizorgis min. Mi vere ne imagis, ke vi ĉiuj estis en tia stato. Daniel

## LKK informas

La urbo Jokohamo forte subtenas la UK-on. Du oficistoj el la koncerna fako observis kun kontento niajn programerojn en la 6-a de aŭg. Ili salutis "Bonvenon al Jokohamo!", "Saluton!" ktp, renkonte al la partoprenantoj, kiuj montris grandan dankemon pro la subtenado de la urbo. Ili ankaŭ ĉeestis en la programeroj en ZAIM en la 5-a. Ili estis forte impresitaj pri entuziasmo de Esperanto-programeroj.

## Iru al ZAIM

**Hodiaŭ, vendrede, la 10-an de aŭgusto**
13:00-19:00 Ekspozicio
14:00-15:30 Ŝamisena kurso
Ŝamiseno: tri-korda japana tradicia muzikilo. Oni povos provludi ĝin. Gvidos TAZIMA Mayuko.
15:30-16:00 Prelego: El Hiroŝimo al la mondo.
21:30-22:30 Danc-kurso: *ĉa-ĉa*, tango, valso ktp.
Gvidos Leo SAKAGUCHI kaj Cosima BREITENSTEIN
22:30-23:30 Koncerto Gvidas TAZIMA Mayuko
23:30-ĝismatene Diskejo kaj Babilejo
Diskludisto Leo SAKAGUCHI
**Morgaŭ, sabate, la 11-an de aŭgusto**
13:00-19:00 Ekspozicio

## novaj aliĝintoj

1887 DOI Julio/ Nishishiba 4-7-13, Kanagawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 236-0017 Japanio
1888 DOI Amiko/ Nishishiba 4-7-13, Kanagawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 236-0017 Japanio
1889 DOI Novulo/ Nishishiba 4-7-13, Kanagawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 236-0017 Japanio
1890 SIMODA Kootaroo/ Toogahara 123-2, 2-416, Hiratuka-si, Kanagawa-ken, 254-0826 Japanio
1891 OOŜIDA Takeŝi/ Koyama-tyo Minami-3-117, Minami-M-201, Tottori-si, Tottori-ken, 680-0945 Japanio
1892 TURUHAMA Mizuki/ Nakashirane 1-19-3, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0004 Japanio
1893 HOSHINO Naoto/ Nakashirane 4-1-2-534, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0004 Japanio
1894 OGAWA Yuuki/ Shirane 6-33-2, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0003 Japanio
1895 KONDO Saki/ Shirane 8-13-3, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0003 Japanio
1896 SHIMIZU Mayumi/ Shirane 6-42-14, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0003 Japanio
1897 IZUMIDA Kengo/ Shirane 2-36-1-109, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0003 Japanio

## hajka angulo

sub sunrostado
la Jokohama ondo
bolas tra l' mondo
KOUBUCHI Shin-ichirou. (KN 1769)

## 50-an UK-on en Tokio 1965 mi partoprenis


KAWANISI Teturo


HIRAYAMA Tomohiro


Glauco POMPILIO


KOBAYASHI Tsukasa


YAMASAKI Motohiro


AOYAMA Tooru


KOBAYASI Utako


Ulrich LINS


Yoshie kaj Dieter KLEEMANN

Pardonon! Pro manko de loko ni ne povas aperigi intervjuojn kun la partoprenintoj en la 50-a UK.

## Dankon al ĉiuj kongresanoj!

Tiu ĉi 6-a numero estas la lasta Kongresa Kuriero. Ĉu la kurieroj estis utilaj kaj interesaj? Ni ĉiam sentis nin varme akceptitaj de ĉiuj kongresanoj. Kun granda dankemo, ni salutas vin: Ĝis la revido en Roterdomo en 2008 !!!

Por la kuriero laboris:
AIKAWA Setuko, AOYAMA Tooru, ARAI Tosinobu, DOI Ĉieko, HIRAYAMA Tomohiro, HONDA Terumi, HORI Jasuo (ĉefo), HOTTA Hirohiko, IWAYA Mituru, KITAGAWA Syôzi, OSIOKA Moritaka, SAKAMOTO Norie, Judyta YAMATO.

Ondas Jokohamo

posta numero

2007-08-25, sabato

redakteja retadreso:

ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO

# Saluto de la nova prezidanto en la Solena Fermo

Probal DAŜGUPTO

Karaj kongresanoj,

Permesu al mi komenci per simplaj dankoj.

Vice de la nova UEA-estraro kaj el mia propra koro mi dankas Renaton CORSETTI, la estraron ĵusan, kiun li prezidis, kaj la aliajn antaŭajn prezidantojn surpodie. Humphrey TONKIN estis la prezidanto en 1977, kiam mi ekaktivis en la movado. LEE Chong-yeong estis la dua azia prezidanto de UEA, post nia unua, Hideo YAGI, kiu forpasis en 1964, longe antaŭ nia tempo.

Sincere kaj aziane dirite, mi petas la benojn de tiuj eksprezidantoj kaj de la eksestraro. Benoj, tro azia vorto, faras el ili altajn guruojn, kiuj ne moviĝas. Bondeziroj, tro eŭropa vorto, farus el ili saltajn kanguruojn, kiuj tro moviĝus laŭ la ritmo de la mandatoj, kaj kies mentorecon mi ne rajtus premisi kiel konstantaĵon.

Sed mi estas aziano. Mi jes premisas la konstantan benemon de pliaĝuloj – de KONISI Gaku, aŭ Tacuo HUĜIMOTO, aŭ Krizantemo, aŭ SYÔZI Keiko, YAMASAKI Seikô. Mi ne nomas miajn eŭropajn aŭ usonajn pliaĝulojn, kiujn tia eksplicitigo embarasus, ĉar paroli pri iliaj benoj aŭ mentoreco ŝajnus al ili tro forte jesi la hierarkion aŭ tro facile nuligi la plue akiritajn liberojn de la okcidento. Efektive, miaj okcidentaj gekolegoj pravus, dirante, ke mi ne povas sincere peti benojn de ili, ĉar tiu esprimo perfidus la etoson de miaj dumvivaj rilatoj al ili – rilatoj diversaj, kaj rilatoj neniam kanguruaj, sed ankaŭ certe ne guruaj. Simile, mi devas konfesi, ke la uzo de la Esperanta vi-pronomo, eĉ pli demokratia ol en la plimulto de la eŭropaj lingvoj malfortigas mian benoricevan senton ankaŭ rilate al miaj japanaj pliaĝuloj. Zamenhof instruis al ni, ke al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio ni diru ĉiam nur "vi". Se mi "ci"-dirus al Usui-kun kaj moŝtige, majuskle "Vi"-dirus al Syôzi-san aŭ Yamasaki-san, mi reproduktus en Esperanto tiajn malsimetriajn, kiujn la japana havas komume kun mia gepatra bengala lingvo.

Resume, mi sentas min aziano, kaj do ne tute senplie egala al miaj okcidentaj pliaĝuloj: mi atendas de ili ion benecan, kvankam ne tute benan. Aliflanke, mi estas neĝisosta aziano, kaj tial ne estas senplie partoprena en la japanaj hierarkioj. Iam GOTOO Hitosi komentis, ke nur en Esperanto li povas diri, ke YAMASAKI Seikô estas inter liaj amikoj. Neniu japana vorto por amiko povus valide kaj verdire esprimi tiun rilaton en lia gepatra kulturo. Mi volas eĥi tiun perceptan konstaton de amiko Gotoo. Li kaj Yamasaki-san – kvankam mi kun plezuro uzas tiun "san" – estas amikoj miaj, de kiuj mi multon lernas, kaj ĉe kiuj mi ja sentas la pliaĝecon de Yamasaki-san, tamen ne irante ĝis la ekstremo guruigi lin.

Vi eble ŝokiĝas kaj demandas vin: kial do tiu ĉi prezidanto sur publika podio regalas nin per konstatoj de sentoj pri personaj rilatoj?

Pardonu. Mi esperas, ke vi komprenos tuj, ke mi fakte provas kontribui al la kongresa temo. La aventuro de Esperanto kiel kultura neŭtralilo estas ankaŭ la eksperimentoj de István ERTL per majuskligo de v en iuj siaj vidiroj, estas ankaŭ la propono de IZUMI Yukio en 1982 alparoli pliaĝulojn per insistaj sinjoro kaj sinjorino por traduki la japanan sufikon "san" aŭ la altan vi-pronomon "anata", kaj aliaj osciloj de niaj diversaj esprimoj de reciprokaj estimosentoj. Ni ne rajtas difini mezon kaj senpacienci ordoni al la oscilado, ke ĝi haltu ĉe tiu mezo por ke ni mezuru la justecon kaj realigu la idealon en de ĉiuj sekvota lingva regularo, obeota de la ideala, meza esperantista sentosistemo. Ne tiel funkcias la fiziko de la osciloj. Ne tiel pulsas la koroj.

Per tiu tuŝo sur la klavon de koroj, mi rapide memorigas vin pri mia salutomesaĝo en la kongresa kuriero. Mi ne havas la tempon por ĝin ripeti ĉi tie, sed temis pri la konkreta socia helpemo de la esperantistaro kiel konsistiga eco de nia lingvanara idealo. Rimarku, mi petas, ke nian lingvon tre ofte lernas

dektrijaruloj kaj sepdektrijaruloj. Malofte lernas ĝin tridekjaruloj. Lingvanaro plenplena je tre junaj kaj sufiĉe maljunaj homoj evidente devas reliefigi la interhelpemon ene de la komunumo. Tiu fluo ofte superfluas en aliajn kanalojn kaj aligas nin al aliaj socihelpaj impulsoj ankaŭ ekster la uzantaro de Esperanto kaj ankaŭ preter la lingva demando. Sed la ĉefa fakto pri ni estas la specifa sperto de Esperantujo. Kia do estas tiu sperto kaj kiel ni povas tiom lerni de ĝi ke tiu lerno povas transporti nin al la necesaj novaj memkomprenoj?

Ni spertas en Esperantujo la veron, kiun esprimas la japana proverbo TASUKE WA HITO NO TAMENARAZU, "La helpo ne estas por la aliaj". La interhelpaj rilatoj inter individuoj, el kiuj multaj estas aŭ tre junaj aŭ tre maljunaj kaj kiuj ofte alikiale malhavas fortan memfidon, faras el ni komunumon, kiu estas palpeble pli forta, ol multaj el ĝiaj individuoj. Aludante al tiu forteco de nia komunumo, mi ne provas elvoki ĉe vi naivan bildon de baldaŭa fina venko. Mi intencas tiri vian atenton al la intensa ĝojo, kiun mi spertas, renovigante niajn amikecojn, malgraŭ tiom da faktoroj, pro kiuj sobra aŭ objektiva taksmaniero instigus nin antaŭdiri baldaŭan disfalon de ĉiuj niaj kunestemoj kaj kunagemoj. La povo ĝoji estas grandega forto. Ni havas ĝin. Tio ĉi estas tre grava. Pro tre komplikaj teoriaj kialoj. Mi esperas klarigi ilin en artikoloj en la revuo, kondiĉe ke Stano MARĈEK konsentu aperigi ilin kune kun la teoria spico kondiĉe ke vi konsentu draŝe kritiki ilin, kaj kondiĉe ke el tio naskiĝu nova kompreno de UEA.

Mi volas, kun via helpo, plifirmigi niajn instituciojn kaj miajn celojn, sed rekompreni ilin pli kongrue al niaj aktualaj realaĵoj. Farante tion, ni foje bezonos malsimple pensi kaj debati. Sed ne sur la podio dum ferma solenaĵo post bonega semajno da debatado pri bonege formulita kongresa temo, pri kiu ni pensu plu, survoje al niaj tre diversaj hejmoj. Koran dankon al tiu ĉi agrabla urbo, lando, regiono. Koran dankon al Unuiĝintaj Nacioj, kiuj deklaris 2008 kiel la Internacian jaron de la lingvoj – ni devos grande fuŝi por ne profiti de tio. Koran omaĝon al miaj kapablegaj samskipanoj. Mi admiras en Claude la senlacan atentadon al la kunmeto de la mikraj kun la makraj realaĵoj en nia kulturo, en niaj kongresoj, en niaj sistemoj, en la eduko kiu ĉie tie niĉas. Mi admiras en Ranieri la juran, strukturan vizion ligitan al vasta kaj profunda konaro en kaj ekster la movado. Mi admiras en Barbara ne nur la legendajn pintojn de Pola Radio sed ankaŭ ŝian konegon de la informa endaro. Mi admiras en Horisan lian sindediĉon al kaj rigoran enplektitecon en la orientazia projekto ĝiskovi la aliajn aziajn movadojn. Mi admiras en José la kombinon de naturscienca rigoremo kun socia konscienco trempita en la historio de niaj sudaj landoj. Mi admiras en Loes la kombinon de financa-administra precizemo kun la sentiva kono de individuoj kaj apartaĵoj. Mi havas nenion por kontribui al ilia kolektivo krom la emon konstante aŭskulti ilin ĉiujn kaj la CO-kolegojn kaj mianivele, eble nur meznivele, kolekti la kolektivon. Mi petas vin kunadmiri ilin kun mi! Fartu bone kaj vojaĝu senmalglataĵe! Ĝis nia Unujariĝo, ĝis Roterdamo! Vivu Hector HODLER! Vivu la posta jubileonto, nia Zamenhof!

## La 92-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis!

En la Solena Fermo, la 11-an de aŭgusto, Osmo BULLER, ĝenerala direktoro prezentis podianojn. Poste ĉeestantoj preĝis silente por la forpasintaj honoraj membroj: William AULD kaj YAMAZOE Saburô.

Sekvis **Premio de Deguĉi** al Duilio MAGNANI (Italio), kiu malavare subtenis esperantistojn kaj neesperantistojn en evoluantaj landoj, **Subvencio de Cigno** al Kuba Esperanto-Asocio, kiu eldonis longe atendatan lernolibron, kies ĉefa verkanto estis Julián HERNÁNDEZ, kaj al UEA pro Agado "Lingvo de Paco", kiu helpas la aranĝon en 2008 de kunveno de esperantistoj apartenantaj al ĉiuj landoj kaj al ĉiuj religiaj grupoj de la Meza Oriento, en Armenio, por ekestigi dialogon inter ili, **Trofeo Fyne** al Unuiĝo de Francaj Esperantistoj, **Diplomoj pri Elstara Agado** al la germana Interkultura Centro Herzberg.

Sekvis anonco pri la rezulto de la Oratora Konkurso kaj honorigo: la unuan gajnis Rolf Peter FANTOM el Britio, la duan WANG Shanshan el Ĉinio kaj la trian SONG Ho-young el Koreio.

Sekvis raporto pri la kongresaj laboroj fare de la nova ĝenerala sekretario, Barbara PIETRZAK, kaj kongresan rezolucion legis USUI Hiroyuki.

Post muzika paŭzo, en kiu pianon ludis TAZIMA Mayuko, okazis Ferma parolado de la nova prezidanto Probal DAŜGUPTO. Clay MAGALHAES, KKS, voĉlegis nomojn de LKK-anoj kaj vic-anoj, kaj invitis ilin sur la podion. Ĉar helpantoj de la kongreso estis pli ol 200 personoj, li ne povis prezenti ĉiujn, kaj do aliaj ekstaris en la halo.

Okazis invito al la UK 2009 en Bjalistoko, Pollando, fare de la urbestro Tadeusz TRUSKOLASKI

en flua Esperanto. Post tio la kongresa flago estis transdonita de SIBAYAMA Zyun'iti (Jokohamo) al Ans BAKKER (Roterdamo). Poste sur la podion venis partoprenantoj kaj zorgantoj de la Infana Kongreseto kaj Infanvartejo, kaj ili kantis kaj prezentis sin.





Post kantado de la Himno la prezidanto fermis la kongreson per martelbato.

De Jokoh-**amo** al Roterd-**amo**, jen du amoj!

## Internacia Arta Vespero

08-10, vendrede okazis Internacia Arta Vespero, en kiu prezentis sian artaĵon jenaj personoj aŭ grupoj:

**1.** Verda Koncerto (grupo el Koreio): instrumenta muziko;
**2.** Hortensio (CHOI Yun-huy el Koreio): korea danco;
**3.** Nova Erao (grupo el Brazilo): kantoj kun gitaro;
**4.** Daniel XAVIER HADDAD (el Brazilo): kantoj;
**5.** IKAI Yosikazu, NAGAI Hiroyuki, SIOMI Motohiko (el Japanio): muziko per okarino kaj fajfado;
**6.** Gomolickaite-Grudzinskaite (el Litovio): fluto;
**7.** YAMAZAKI Machiko (el Japanio): Danco pri surmetado de kimono;
**8.** KIMURA Sonoko (el Japanio): klasikaj kantoj kun pianoakompano de TANAKA Teiiti;
**9.** Klarita VELIKOVA (bulgarino el Britio) kaj Amerkeshev RUSTEM (kazaĥo el Koreio): Tekkjono, danceca korea batalarto;
**10.** Korusa Grupo gvidata de ONO Tadahito (el Japanio): kantoj japanaj;
**11.** Gao (el Ĉinio): saniga danco el Taj-ĉi;
**12.** Vida JERMAN ( el Kroatio): deklamado;
**13.** Internacia koruso (el diversaj landoj): koruso;



## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj

08-10, vendrede, la rerezultoj de la Belarta Konkusro estis publikigitaj.

**POEZIO**

1. Unua premio: Anja KARKIAINEN (Finnlando) pro "En ambaŭ";
2. Dua premio: Michael CAYLEY (Britio) pro "Memoroj";
3. Tria premio: ne aljuĝita.

Partoprenis 30 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

**PROZO**

1. Unua premio: Tim WESTOVER (Usono) pro "Ruĝvela ŝipo";
2. Dua premio: Lena KARPUNINA (Rusio) pro "La botoj";
3. Tria premio: Sten JOHANSSON (Svedio) pro "Frotvundo".

Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj.

**ESEO**

1. Unua premio: Geoffrey SUTTON (Britio) pro "Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo";

2. Dua premio: Paulo S. VIANA (Brazilo) pro "Psiko-memhelpa literaturo: utila? senutila? malutila?";
3. Tria premio: Tony DEL BARRIO (Hispanio) pro "La normala lingvo".

Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj.

**TEATRO**

1. Unua premio: ne aljuĝita;
2. Dua premio: Brian E. Drake (Usono) pro "Koroj en mallumo";
3. Tria premio: ne aljuĝita;

- Honora mencio: Stefan MACGILL (Hungario) pro "La aŭto-mato".

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

**INFANLIBRO DE LA JARO**

- Eldonejo "Éditions Pour penser á l'endroit" pro la libro "Ĉio fareblas de Aline de Pétigny", tradukita de Martine kaj Christian Riviére.

Partoprenis 5 verkoj el 5 landoj.

**KANTO**

Unua, dua, tria premioj: ne aljuĝitaj;

- Honora mencio: Dina LUKJANEC (Kazaĥio) pro "La urbo ora".

Partoprenis 8 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

## Nova aliĝinto

1901 Kamijama Seiĵi/ Mizukuti-tyo 5-50-401, Atami-si, Sizuoka-ken, 413-0016 Japanio

## Dankon pro la mesaĝoj!

Pro reta *Ondas Jokohamo* ni ricevis multajn mesaĝojn al la kongreso. Ni bedaŭras, ke ni ne povas prezenti ĉiujn mesaĝojn. Ĉar n-ro 4 en la reto estis tro grandkvanta, multaj sendis plendojn. Ni do pli-malpezigis ĝin. Bonvolu reprovi!

**el Francio**

Ni volas ĉi tie gratuli la LKK-anojn kiuj proponas al esperantistoj, kiuj ne povas nun ĉeesti la UK-on, rete sekvi la UK-ajn okazaĵojn. Tiel, de malproksime, ni povas ĉiutage iom partopreni la UK-on dank'al viaj retaj kurieroj *Ondas Jokohamo* kaj ankaŭ la bonkvalitaj fotoj. Krome ni vidis ke, en la kongresa kuriero n-ro 2 kaj sur foto nomata "Komunika servo", du personoj profesie filmas. Ĉu vi intencas eldoni kongresan filmon ? Estos bone.

Geneviève kaj Maurice GOURICHON

**el Pollando**

Bonvolu transdoni miajn gratulojn al ĉiuj estraranoj novelektitaj kaj tutspeciale al Barbara PIETRZAK, la nova ĝenerala sekretario de UEA.

Andreo PETTYN <a.pettyn@wp.pl>

**el Hispanio**

Saluton. De malproksima Hispanio mi gratulas la kongresanojn kaj specife la bultenon *Ondas Jokohamo* kiu permesas la neĉeestantojn ĉeesti. Mi salutas la konatulojn kaj deziras, ke novaj interesatoj esperantistiĝu.

Jose SALGUERO.

**el Latvio**

Virtuala ĉeesto, kvazaŭ realeco. Ankaŭ ĉeestate neeblas partopreni en ĉiuj eroj de programo. La bilda galerio apudas kun folio *Ondas Jokohamo*, kaj belege ilustras procedon. Restas sekvonta paŝo por UK, ĉar teknikaj rimedoj tion jam solvas – organizi laŭvican UK en du aŭ tri lokoj de la terglobo, samtempe sub unu laŭvica nomero. La mondo ekmiregos. Kelkfoje alkreskos kvanto de partoprenontoj, pli simple kaj facile estos solveblaj demandoj de enloĝigo, uzota trafiko, ktp. Por UEA restos nur problemo koordini agadon kaj por estraro solvi trafikproblemon por ĉeesti en ĉiuj lokoj de kurenta UK. Ideo, kvankam freneza tamen realigebla, kaj neimageble propagandos Esperanton. Ĉu ni aprobu?

Jazeps SHLARS

**el Makedonio**

Estimataj samideanoj, geesperantistoj je la tuta mondo, ĉeestantoj en 92-a UK en Jokohamo, Japanio je mia nomo, kaj je la nomoj de geesperantistoj el Makedonio mi deziras al Vi sukcesan kaj fruktodonan laboron dum la kongresaj tagoj!

Viktor GALESKI

**el Ĉinio**

Mi dankas al vi. Mi konsentus, se vi tute aŭ resume volus aperigi mian legantleteron. Mi konscias, ke mia kontribueto aldonus malmultajn bajtojn al venonta eldono de *Ondas Jokohamo*. Ĉu papera spaco permesos?

Ueli Haenni

**el Urugvajo**

Mi gratulas vin pro la laboro informi al la esperantistaro la okazaĵojn en la UK. Mi ĝoje informiĝis pere de ĝi, kaj povis miavice informi al niaj aŭskultantoj el Radio Aktiva, kiu disaŭdigas interrete 24 horojn tage, informante pri la diversaj aferoj rilate al nia lingvo. La pasintan monaton mi vojaĝis al Brazilo por elsendi rekte de tie, la landan brazilan kongreson. Tiam ni povis disaŭdigi ne nur raportojn kaj intervjuojn, sed ankaŭ plurajn prelegojn kiujn mi sonregistris kaj sendis interrete al nia lando por disaŭdigo. Bedaŭrinde, estis neeble partopreni la plej gravan kongreson de nia movado, la UK, sed ni bone sukcesis informi al aŭskultantaron danke la servon ke vi plenumis. Pro tio ni tre dankas kaj gratulas pro la bonega tasko plenumita.

Sonia RISSO el Radio Aktiva
<http://radioaktiva.esperanto.org.uy>

Ondas Jokohamo
ekstra numero
2007-08-11, sabato
redakteja retadreso:
ondas@jei.or.jp

KONGRESA KURIERO DE LA 92A UNIVERSALA KONGRESO EN JOKOHAMO, JAPANIO

# Rezolucio de la 92a Universala Kongreso de Esperanto

La 92a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto",

Konstatinte, ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter "Okcidento" kaj "Oriento", sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

Konstatinte, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

Notinte, ke tro rigidaj konceptoj pri "Okcidento" kaj "Oriento" malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

Notinte kun kontento, ke la 2008a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

Rekomendas, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,

Konfirmas la potencialon de Esperanto por interponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

Atentigas samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

Deklaras, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

Esprimas la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.

## raportoj

### 1. Vizito al Rehabilitada Centro de Jokohamo

08-07, marde posttagmeze, sub la gvido de UEDA Satosi (KN 398) 10 medicinistoj vizitis la urban institucion, Rehabilitadan Centron de Jokohomo.

D-ro Itoo, la prezidanto de la centro prezentis la institucion per filmo. La ĉef-terapeŭto, s-ro Miyazi kondukis nin al vasta gimnastikejo, kie ludas handikapitoj tablotenison ks. En apuda ĉambro estas instalitaj diversaj trejnmaŝinoj. Li emfazis: trejnekzercado nun estas enuiga kaj peniga laboro, sed per alternado de trejnado kaj ludoj, ili sentas sin progresanta en la rehabilitado.

La ĉefa teknikisto, s-ro Iijima montris al ni la laboratorion. Teknikistoj esploras komputil-simuladan programon por reformi loĝdomon de handikapitoj, aŭ ekipaĵon reguligi medion de tetraplegiulo per sia spirblovado.

Hideki HARADA (KN 219)

### 2. Japana Animacio – Ĝiaj historio kaj karakterizaĵo

08-09, ĵaŭde, en *Lapenna*, prelegis HAYASI Kaneyuki pri la temo.

Unue historiaj kaj industriaj flankoj estis klarigitaj: naskiĝo de unua japana animacio en 1945 sub militismo; populariga kariero de bildstria gazeto ĝis televido kaj kino; industriiĝo laŭ media mikso kun diversaj varoj, ekzemple ludiloj, manĝaĵoj, pupaj figuroj ktp.; la media mikso determinas eĉ koloron de haroj kaj okuloj de la ĉefaj figuroj...

Due menciante Walt Disney kaj Studio *Ghibli*, tipa kontrasto de usona kaj japana animacio estis klarigita: dualismo kaj plurismo bazita de diferenco de pensmaniero de Okcidento kaj Oriento, kiel japana filozofo SUZUKI Daisetz opinias; klareco de venko kaj malvenko; simpleco kaj komplikeco, pri kiu la preleganto argumentas, ĉu infanoj akceptas komplikecon en enhavo kaj poezio, kaj ĉu violentecon de Princo Ashitaka infanoj akceptas ktp.

HOTTA Hirohiko (KN638)

**3. TEJO sin prezentas**

08-09, ĵaŭde okazis la kunsido. Ĉi tiu programero suferis pro manko de reprezentantoj de TEJO.

Dum la ĵusa IJK oni ne povis elekti novan estraron pro manko de kvorumo. Ĉeestantoj aŭdis la enhavon de letero al la patronoj de TEJO, en kiu oni raportis pri la pasintjaraj atingoj, inter kiuj estas menciinda la jura statuso de TEJO en Nederlando kaj la bonaj rilatoj kun UEA.

Tre atentinda estas la propono estonte organizi la IJK-n en la kadro de la UK pri kiu raportis, interalie la reprezentanto de TEJO en la komitato de UEA, Peter Baláž, KN 1764.

raportis Diccon MASTERMAN (KN 142)

**4. Ekskurso al Sankei-en**

08-06, lunde, 46 ekskursis al la ĝardeno Sankei-en. Ĉar la tago estis memortago pri la atombombo en Hiroŝimo, en la buso veturanta oni preĝis por la animo de la viktimoj dum 5 sekundoj.

TANIGAWA Hirosi (KN 243)

**5. Ateismo kaj Esperanto**

Dum la kongreso de la libera penso, en Parizo, en 1905, deziresprimoj estis akceptitaj favore al Esperanto. La libera penso estis do inter la unuaj organizaĵoj en Francio kaj en la mondo, kiuj deklaris opinion fovore al Esperanto.

*Cambridge*, Britujo,1907. Tiam okazis la 3-a UK de Esperanto. Dum ĝi fondiĝis internacia asocio de liberpensuloj sub la nomo "Libera penso". Inter la 25 membroj-fondintoj, estis konataj nomoj kiel Moch kaj Bourlet.

Memore al la centjariĝo de la libera penso prelegis Dominique SIMEONE dum la forumo de ATEO, vendrede posttagmeze.

Claude NOURMONT (KN 78)

**6. La Komitato de UEA**

08-10, vendrede, oni kunsidis sub la gvido de la nova prezidanto Probal DAŜGUPTO. Oni diskutis pri raportoj el kunsidoj de ok subkomitatoj kaj faris decidojn pri la rekomendoj en tiuj raportoj.

Nova landa asocio estas akceptita: Asocio de Esperantistoj de Taĝikio. La nova komitatano s-ro Saidnabi Saidilĥomzoda (el Taĝikio) alparolis la Komitaton per dankaj vortoj.

La Internacia Ekzamena Komisiono de UEA kaj ILEI havos novan konsiston post konfirma voĉdono de ILEI en la venonta semajno.

La buĝeto pri la jaro 2008 estas decidita. La Komitato decidis pri rekomendoj al la estraro pri laboro por la UN-temo "2008 internacia jaro de lingvoj"

Ulla LUIN (KN 80)

**7. Rondo Kato**

Dum la kunsido oni ankaŭ prezentis la lastan numeron de la gazeto, kiu havas kiel ĉefartikolon pri la origino kaj diversaj signifoj "maneki neko", tradicia kultaĵo japana en formo de kato, kiu levas unu maneton voke. Ĵurnalistino de japana katrevuo fotis la kunsidon kaj raportos pri ĝi.

Pro la zorgado de la budo dum la Movada Foiro dankon meritas la reprezentanto de Rondo "Kato" en Japanio, Shigeko OOBA, kaj aparte Ana MONTESINOS, kiu multe helpis Rondon "Kato" dum la UK.

Rondo "Kato"/ Esperantista Kat-amikaro

**8. Kunsido de LIBE**

08-10, vendrede okazis la kunsido de LIBE (Ligo de Internaciaj Blindaj Esperantistoj). Ĉ. 40 ĉeestis.

Blinduloj povas legi nur brajligitajn paperojn, sed komputile ili povas aŭdi mesaĝojn voĉe. Kiel provo unu voĉlegigis per komputilo unu parton de la kongresa libro. En ĉi tiu kongreso estis eldonita brajligita versio de *Ondas Jokohamo*, kaj pro tio la ĉeestantoj esprimis dankon al la koncernatoj.

HONDA Terumi (KN 247)

## Kongresanoj Invitas

**1. Vizitu Grezijonon en Francio**

Nia esperantista kastelo akceptas grupojn ĝis 50 personoj kaj la komitato penas organizi 6-semajnajn staĝojn dum la somero. Mi, Jannick HUET-SCHUMANN (komitatano) bedaŭras, ke la nombro de la staĝanoj ne sufiĉas por plenigi la kastelon, malgraŭ tio, ke homoj dediĉas forton kaj tempon por ĝin ripari kaj beligi dum la tuta jaro. Mi proponas kursojn fare de spertuloj interalie de alilandanoj, por ke la kutima vivo dum la staĝo estu internacia kaj oni bone uzu Esperanton. Mi esperas, ke japanoj vizitos Grezijonon pli multnombre en venontaj someroj.

**2. Liaoning (Ĉinio) atendas vian respondon**

La provinco Liaoning de Ĉinio starigis ĝemelan rilaton kun du gubernioj de Japanio: Kanagawa kaj Toyama, kaj havas multajn ĝemelajn urbojn en Japanio. Ili estas Tonami, Sapporo, Kawasaki, Obihiro, Maizuru, Tokushima, Iwaki, Yubari, Miyazaki, Nagao, Takaoka, Kitakyusyu ktp. Por aktivigi lokan Esperanto-movadon, ni, Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, esperas kontakti samideanojn en tiuj regionoj. Ni atendas vian respondon.

WU Guojiang(KN1640)
<ghemelaurboj@yahoo.com.cn>

**3. Rekta komerco de legomoj...**

Ĉu iu el japanaj samideanoj konas ion pri TEIKEI (TEJKEJ)-Asocio por rekta komerco de legomoj, fruktoj ktp. Inter kamparanoj kaj urbanoj (*France amap*). Bv. kontakti min. (KN 1371)

**4. La Meksika Esperanto-Federacio**

Ni invitas vin al la 8-a Landa Kongreso en la urbo *Agvaska Ljentes*, la loko de la Meksika Esperanto-Instituto. La kongreso okazos en 1-5 de majo 2008. La antaŭkongresa ekskurso komenciĝos en la 26-a de aprilo en Meksikurbo. Ni veturos per buso kaj vizitos la plej belajn urbojn, antaŭ ol ni atingos la gastigontan urbon. Por pli da informoj havu kontakton kun Mar ĉe: <Mar@GrupoAmikema.org>.

**5. Tekilo**

La Monda Esperanto-Movado havas sian propran tekilon! Ĝi estas produkto el Meksikio. Por pli da informo vizitu <www.teqilaesperanto.com>, aŭ sendu mesaĝon al <Tekilo@Grupoamikema.org>

**6. Petskribo por Esperanto ĉe UNo**

Ĉu vi jam subskribis la petskribon por Esperanto ĉe UNo? La titolo estas "Bonvolu agnoski Esperanton kiel vian oficialan lingvon".

Vi povas subskribi perrete ĉe <www.petitionspot.com/petitions/esperanto>. La teksto haveblas en diversaj lingvoj ĉe la *Yahoo*-grupo "Petskriboj". Retadreso: <Petskriboj-owner@yahoogroups.com>. Pli ol 6000 personoj kaj grupoj jam subskribis! Nepre faru tion ankaŭ vi. Memoru indiki vian loĝlandon kaj inkluzivu komenton.

**7. Demandoj pri *La Alkemiisto*, de Paulo COELHO**

Oftas demandoj pri la libro *La Alkemiisto*, de Paulo COELHO. Vi trovas informojn pri la libro kaj fotojn de la evento. Carlos VALLE

http://br.geocities.com/carlosrgvalle/LaAlkemiisto.html

**8. Eŭropa manifestacio**

Okazos la manifestacio en 1-15 de julio 2008, de Parizo (Francio) ĝis Kompostelo (Hispanio) kaj revene por diskonigi intereson de Esperanto por Eŭropa Unio (demokrate, mone, lingve, diversece, efike). Informiĝu, disvastigu informon, konsilu, helpu (mone ktp!) kaj ĉefe per PARTOPRENO!

Michele ABADA-SIMON (KN 1360)

## Speciala karavano

Sub gvido de s-ino Tatjana LOSKUTOVA el Rusio, la tuta karavano da okcident-eŭropanoj alvenis jam vendredon por la 92-a UK. La vojaĝo komenciĝis la 15-an de julio en Moskvo, kie ni (22 el Francio, Nederlando, Italio kaj Svislando) kolektiĝis. De Moskvo ni trajnis (per Trans-siberia Fervojo!) unue al la Bajkal-lago, por pasigi tie kelkajn tagojn. Post ĝuado de ties beleco, ni plu trajnis al Vladivostoko. En tiu brilege gaja urbo ni ree pasigis kelkajn tagojn. De tie, per ŝipo ni veturis al Niigata (Japanio) kaj de tie do al UK. Vere mirinda kaj rekomendinda vojaĝo! Gerrit BERVELING (KN 385)

## Bedaŭrinda afero

Saluton al ĉiuj!

Espereble iuj partoprenantoj en la Jokohama UK legos ĉi tiun mesaĝon, ĉar temas pri grava malbona novaĵo por la geklubanoj de la asocio *ARRAS-ESPERANTO* (el la urbo Araso en norda Francio), kiu jam de kelkaj tagoj veturis trajne de Moskvo al Vladivostoko, kaj partoprenos la UK-on en Jokohamo. Bv. sciigi ke ĵus forpasis nia amiko Max BECANT. Jean HENNEBERT

<http://arrasesperanto.free.fr>

## László TONY parolis pri Esperanto

László TONY, aliland-devena, kiu estas fame konata verkisto kaj loĝas pli ol 20 jarojn en Japanio, parolis pri Esperanto en intervjuo de *Ondas Jokohamo*. Li lastatempe publikigis sian etan bildrakonton (la bildon desegnis lia edzino) en iu gazeto, en kiu li asertas, ke Esperanto estas lerninda lingvo kaj klarigas pri elementa skizo de nia lingvo.

En la intervjuo li klarigis, ke li kapablas paroli kvar lingvojn: la angla, japana, germana, kaj Esperanto, kaj uzante "Pasportan Servon" li pasigis kelkajn tagojn en Italio. Sed partopreni en la Universala Kongreso estas ĉi-jare unuafoje por li.

Li rakontis unu sperton en ĉi tiu kongreso, ke li akompanante membrojn de litova muzikgrupo *Asorti* iris al vendejo de muzikiloj por helpi ilin aĉeti gitaron. Pro tio, ke estas esperantisto inter ili, kaj dank' al interpretado de László, ili povis facile aĉeti ŝatatajn gitarojn. Unu membro, kiu ne sipovas Esperanton, miras, ke Esperanto estas fakte vivanta kaj uzebla lingvo.

László per siaj spertoj akcentis, ke unuvorte dirite lerni Esperanton estas utile kaj ĝojige. Ĉar, unue, lernante Esperanton, oni facile povos kompreni la strukturon aŭ mekanikon de aliaj lingvoj. Due, dank' al ellerno de nur unu lingvo Esperanto, oni povos kapti multajn vortojn de diversaj eŭropaj lingvoj. Sekve, oni povos ĝui interkomunikiĝon kun alilandanoj havante sciojn pri lingvoj alilandaj pere de Esperanto.

Kompreneble, videbliĝos la sceno, en kiu ekzemple litovo kaj koreo kaj kubano interkomunikiĝos per angla lingvo, sed se oni uzos Esperanton kiel pontlingvon, fariĝos pli justece. Ĉar, en la kazo de Esperanto oni neniam pripensas pri antaŭulo aŭ posteulo en lernado kaj aliaj.

intervjuis KITAGAWA Syôzi (KN 356)

## Novaj aliĝintoj

1898 KONDO Makiko/ Ogawa-nishimaĉi 5-19-4, Kodaira-ŝi Tokio, 187-0035 Japanio

1899 MIZUNO Katunori/ Itiba-simotyo 4-33-203, Turumi-ku Yokohama-si, Kanagawa-ken, 230-0024 Japanio

1900 NAGASAWA Huminari/ Kawasimatyo 164-3, Asahi-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, 241-0011 japanio

## Epizode

Niaj kurieroj estis presitaj en la prescentro de la ekspoziciejo apud nia kongresejo. Ni transdonas al ĝi materialon per la formo de *PDF* je 20:00 ĉiuvespere, kaj la centro tuj komencas presi prekaŭ 2000 ekzemplerojn, kaj portas en nian ĉambron poste. Iu oficisto diris al ni, ke ordinare en internaciaj kongresoj oni presas dokumentojn en kelkaj lingvoj: ekz. en la angla, germana, franca, japana ktp. Tamen antaŭ tio oni devas traduki originalajn tekstojn en tiujn lingvojn, kaj poste faras tradukitajn plurajn dokumentojn. Do, post meznokto ili devas presi. ↗ Ke oni uzas nur unu lingvon, estas tute efike, je kosto kaj homfortoj, la oficisto diris. Interesa afero por ni, ĉu ne?

**Jokohamo 2007**

*Minato-Mirai*

En haveno de estonco
Ni deponis la valizojn
Ni renkontis tutmondanojn
Buntan bukedon ni formas
    Sed grava koloro mankas
    Kien iras afrikanoj?
    Demandis mi al nigrulo :
    "Mi ne, el Kubo mi venas"
Afrikanoj ne ekzistas?
Al angolano ĉuis mi
Senkulpiĝis li kun tristo:
"Portugalo mi por ĉiam"
    El Reunia insulo
    Venis anonco po unu
    Sed ne eblas konsideri
    Tie francan civitanon
Kien vi iras gefratoj
El afrika kontinento?
Kial ni ĉiuj lasis vin
Al soleciga mizero?

Marie-France Conde-Rey (KN 1611)

## hajka angulo

Ekster salono
Juna ekzamenoto
interne timos

Diccon MASTERMAN (KN 142)

### 50-an UK-on en Tokio 1965 mi partoprenis

Temis pri la unua Universala Kongreso en Azio, karakterizita de notinda intereso de japanaj esperantistoj por kontakti eksterlandon kaj sperti la lingvon. Ĉio estis nova por ni eŭropanoj, ĉar Japanio ĵus eniris la mondajn merkatojn. Tiam mi deĵoris kiel projektisto en *FIAT* aŭtomovil-fabriko en Italio kaj dum la kongreso mi estis invitita de la direkcio de *ISUZU Motor Kompany*, kie mi prezentis dokumentan filmon en Esperanto pri *FIAT*.

Giuseppe GRATTAPAGLIA (KN 1505)

## Venontjaraj Kongresoj

La 93-a UK okazos en Roterdamo, en 19-26 de julio 2008 celebrante la 100-jariĝon de UEA. La Centra Oficejo laboros por ĝi.

La 94-a UK okazos en Bjalistoko, Pollando, kie naskiĝis d-ro L. L. Zamenhof. Por tio la urbestro de Bjalistoko Tadeusz TRUSKOLASKI partoprenis en la nuna UK, kaj en la kunveno de Venontaj Kongresoj la urbestro parolis sufiĉe longe en bona Esperanto.

### Saluto de urbestro Herzberg, la Esperanto-urbo

Kiel Urbestro de Herzberg – la unua urbo en la mondo kromnomita "Esperanto-urbo" – mi transdonas al vi la plej varmajn bondezirojn de sukceso en la nomo de la enloĝantaro de la Urba Konsilantaro kaj en mia propra nomo.

Kun ĝojo kaj fiero mi informas vin, ke en Herzberg jam de kelkaj jaroj Esperato estas instruata en kelkaj lernejoj...

La "Esperanto-urbo" estas via urbo: Tial mi invitas vin viziti kaj ĝui ĝin venontjare kunlige kun la Universala Kongreso en Roterdamo.

Via, Gerhard WALTER (Urbestro)

### Dankon al ĉiuj kongresanoj!

Ni skribis, ke la 6-a numero estas la lasta. Sed tro multe da materialoj restis. Ni do decidis eldoni la ekstran numeron. Tamen restas ankoraŭ artikolo intervjuita de Judyta Yamato. Ni publikigos iam, iel.

Se vi volas ricevi malnovajn numerojn, venu al la ĉambro de LKK (421).

Ĝis la revido en Roterdamo!